

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

8

1999

ISSN 0032 - 4361



Vizito al Makao (I)

Ĉinio kaj akvomanko

Ŝanĝigoj en 50 jaroj (I)



Rottneros Parko en Värmland

de BOO MEE KIM-LINDBLOM (Svedio)

Sur la vasta teritorio de Ĉinio krom trosekeco ofte okazas ankaŭ inundo, tial akvo estas multe atentata de la homoj. Niaj legantoj ofte skribis al ni pri tiu problemo. Nia germana leganto Josef Kondor skribis: "Certe mi povos legi scenojn de la bataloj kontraŭ la ondoj en la ĉiam aktuala, bonege redaktita EPC!" Nia nederlanda amiko Hans Erasmus skribis al ni en la pasinta jaro: "Ĉi-somere ni multe interesigis pri la sorto de tiuj ĉinoj, kiuj suferis de la inundoj denove... Dankon pro via raporto en n-ro 12 de EPC!" Nia alia germana leganto Ernst Diedrich skribis: "Ni petas vian afablan respondon... pri akva ekonomio." Li diris: "Tiu esprimo estis uzata en gazeto germanlingva pri la agrokulturo per akvo en Egiptio kaj Ĉinio, en estinta lando de Inkao en Ameriko." Li diris ankaŭ: "Ni maljunaj komunistoj vidis la grandajn filmojn pri la tempo de Mao, pri la grandaj komunumoj en batalo kun la akvo, kie miloj da homoj kreis digojn." Li demandis: "Per transiro de la komunumo al privatigado oni detruas la tutan akvan ekonomion, ĉu vere?"

Koncerne tiun problemon, ni opinias, ke oni povas juĝi ĝin de du flankoj: Unuflanke Ĉinio ĉiam prenas agrikulturon kiel bazon de sia ekonomio kaj rigardas akvon kiel aorton de sia agrikulturo. La graveco de la problemo pri akvo estas vidata ankaŭ en la projekto de la disvolviĝo de Ĉinio kaj ties leĝoj. Efektive la akvoutiliga konstruado neniam ĉesis en diversaj lokoj de Ĉinio, tion ekzemplis la akvoutiligaj konstruoj Liujixia, Wanjiashai, Gezhouba k.a., kiuj estas senprecedencaj en la ĉina historio. Aliflanke, iuj lokoj neglektas la akvoutiligan konstruadon, eĉ senbride hakas arbojn, kio fariĝis unu el la ĉefaj kaŭzoj de inundoj de Ĉinio en la lastaj jaroj. En tiu ĉi numero estas la artikolo "Ĉinio kaj akvomanko", kiu konigas konsilojn de fakuloj pri protekto kaj utiligo de la akvofonto. Ili estas ankaŭ kontrolantoj de la akvo-administrado de Ĉinio.

La Red.

El Popola Ĉinio

8 [491] 1999



Drakaj kolonoj

Foto de Liu Sigong

La 1-an de majo inaŭguriĝis en Kunming la Monda Hortikultura Foiro. En la ĉina ekspoziciejo staris kvin drakaj kolonoj, en alto de kvar metroj, faritaj ĉiu el kompleta ŝtono de Quanzhou, Fujian-provinco. La kolonoj prezentas belajn bildojn, kiuj tre interesas la vizitantojn.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu
Adreso: P.O. Kesto 77,
Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso:
+86-10-6832 1808

Retpoŝto:


epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

ENHAYO

- | | |
|--|--|
| <p>2 INTER NI</p> <p>4 Ĉinio sin preparas kontraŭ inundo</p> <p>6 Ĉinio kaj akvomanko</p> <p>9 ORIGINALE VERKITAJ:
Poemoj</p> <p>10 EKONOMIE:
Ŝanĝiĝoj en 50 jaroj (I);
Reformado de telekomunikado;
Kurantaj aferoj</p> <p>13 ESP-NOVAĴOJ</p> <p>14 ĈINAJ E-ISTOJ:
Sindediĉo al Esperanto</p> <p>16 JUNULARO:
Inter la du generacioj</p> <p>18 Ŝtonskulptisto kaj liaj asistantoj</p> <p>20 SERĈO DE SHANGRILA:
Serĉi lulilon de Dongba-kulturo</p> <p>24 POR KOMENCANTOJ:
Konstrui domon por si mem</p> <p>25 Harmonio de la homaro kaj naturo</p> <p>28 Puran medion al turistoj</p> <p>29 HOMARO KAJ NATURO:
Hejmo de sovaĝaj elefantoj</p> | <p>32 Ok jaroj da nomadismo ĉirkaŭ la mondo</p> <p>34 Lignoskulpturo de Quanzhou</p> <p>35 Alilandaj studentoj en Ĉinio</p> <p>38 Vizito al Makao (I)</p> <p>40 MULNACIA ĈINIO:
Nacimalplimulta aŭtonomeco en Ĉinio</p> <p>42 La ĉina lingvo kaj la ĉina kulturo (I)</p> <p>44 EL ĈINAJ GAZETOJ</p> <p>46 Ensemblo en montregiono</p> <p>48 La taoisto de Laoshan (Novelo)</p> <p>50 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:
Kiamaniere ĉinoj intersalutas ĉe renkontiĝo?</p> <p>51 ĈINAJ METIARTAĴOJ:
Ekranaro de Qing-dinastio</p> <p>2 FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:
Rottneros Parko en Värmland</p> <p>SUR LA DORSKOVRILO:
Ĉielarko super Lijiang-rivero</p> |
|--|--|



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|-----------------------|-----------------------------|
| 1. Hubei-prov. (p. 4) | 4. Interna Mongolio (p. 40) |
| 2. Ningbo (p. 14) | 5. Tianjin (p. 44) |
| 3. Makao (p. 38) | |



Ĉinio sin preparas kontraŭ inundo

de XIANG HONG

ĈINIO estas agrikultura lando. En ĝi ĉiuj regionoj abundaj je riveroj kaj lagoj, kiaj Songnen-ebenaĵo en nordorienta Ĉinio kaj Jianghan-ebenaĵo en meza baseno de Yangzi-rivero, estas ĝiaj gravaj gren-, koton- kaj ole-produktaj bazoj. Kontraŭ superakvo de tiuj riveroj kaj lagoj oni konstruis multajn digojn. Nun en Ĉinio duono de la loĝantoj, 33% de la agraro kaj 70% de totala valoro de industria kaj agrikulturaj produktoj estas protektataj de la digoj.

Sed en 1998 katastrofe inundis la riveroj Songhua, Nenjiang kaj Yangzi, tio malkovris mankojn en akvoutiliga konstruo de Ĉinio, el kiuj la plej gravaj estas jene: A) La kapablo de digoj kontraŭ

inundo estas malforta. Nun, escepte de la digo de la Flava Rivero, kiu kapablas rezisti kontraŭ granda inundo okazanta en ĉiu 60-a jaro, tiuj de aliaj plejparte kapablas nur kontraŭ inundo, okazanta en ĉiu 10-20-a jaro kaj tiuj de malgrandaj riveroj estas des pli malfortikaj. B) La kvalito de digoj estas malbona. La ĉefaj digoj de grandaj riveroj en Ĉinio plejparte formiĝis en plialtigo kaj plidikigo dum senĉesa batalo kontraŭ inundo, tiel la digoj ne estas fortikaj. Kaj plie en riveroj kaj lagoj oni faris milojn kaj milojn da polderoj por konstrui domojn kaj kulturaj kampojn. Tio ege malhelpis akvokonservadon kaj ellason de akvo el inunditaj lokoj. Pasintjare la grandega inundo en la meza kaj malsupra basenoj de Yangzi-rivero ruinigis 2 mil pol-

derojn kaj la katastrofo atakis 2.31 milionojn da loĝantoj.

En majo mi vizitis Hubei-provincon en la meza baseno de Yangzi-rivero multe suferintan de superakvego pasintjare. Tie multaj diris al mi: "Sen akvoutiliga konstruo, malfacilas administrado, malriĉas la popolo kaj mankas socia stabileco."

Maje, sur la vasta Jianghan-ebenaĵo maturiĝis tritiko. Apenaŭ rikoltinte kolzojn, kamparanoj sin okupis pri priklado. Se oni ne rakontus al mi pri la pasintjara inundo, mi ne povus imagi al mi kiel la inundo furiozis sur tiu fekunda kampo. En Jingang-vilaĝo inundita pasintjare nun staras vico post vico da novaj loĝdomoj, en kiujn enloĝiĝis 325 familioj antaŭ la Printempa Festo ĉi-jare. Nun prosperas la oranĝar-

bidoj, kiujn la registaro senpage liveris kaj la vilaĝanoj plantis post la inundo. Antaŭ la 2-etaĝa domo vilaĝanino Chen Changhui konigis al mi, ke tiu domo estis konstruita de ŝi kaj alia familio de la vilaĝo. Por la konstruo la registaro pagis 70% de la bezonata mono kaj ili mem pagis nur 30%.

Menciante la katastrofon, ŝi ne povis reteni siajn larmojn: "Nia vilaĝo estis bonhava antaŭe, sed la inundo forrabis niajn domojn, fruktarbojn kaj brutojn." Ŝi daŭrigis, ke helpate de la registaro, la vilaĝanoj unuapaŝe revigligis la produktadon en kelkaj monatoj. Ŝi kredas, ke ili denove bonhaviĝos 5 jarojn poste.

Zou Xinpei, respondeculo de la vilaĝo, aldone diris: "Ni bone komprenas la gravecon de 'akvoutiligo' nur post la granda katastrofo."

Zhang Shengpeng, oficisto pri akvoutiliga konstruo dum longa tempo, diris, ke pro malsufiĉeco de la akvoutiligaj konstruoj, senbrideco de polderigo kaj seriozeco de la grunda erozio multaj lokoj de Hubei-provinco grave suferis de la inundo en la pasintaj jaroj. Sole en 1998 la inundo ruinigis 160 mil domojn kaj detruis 300 mil domojn en Hubei. Li diris:

"Sen efikaj rimedoj kontraŭ inundo, neniam planoj pri riĉiĝo realiĝos. La ĉina registaro decidis ŝanĝi en tri jaroj la ĉefajn digojn de grandaj riveroj kaj lagoj en la altkvalitajn kaj samtempe praktiki la planon nuligi la polderojn."

De aŭtuno pasintjara ĝis majo ĉi-jara la plej urĝaj laboroj de la akvoutiligaj laboroj de Ĉinio estas jenaj: rekonstrui la digojn detruitajn en 1998, firmigi la digajn bazojn,

preni taŭgajn rimedojn por preventi ajnan danĝeron, plialtigi kaj plidikigi la partojn de la malnovaj digoj, kiuj dependis de helpaj digoj en inundo pasintjare. Por tio, Hubei kaj aliaj provincoj en la meza kaj malsupra basenoj de Yangzi-rivero multe pliigis laborforton, instalaĵojn kaj investon.

Zhang Shengpeng prezentis al mi la ĉefajn trajtojn de digkonstruado ĉi-jara. Anstataŭ la tradiciaj konstruaj rimedoj nun oni faras digojn per avangardaj modernaj maŝinoj kaj teknikoj. Oni plifortikigas digojn kaj pliigas ilian likimunecon per materialoj kaj teknologio importitaj el aliaj landoj. Uzado de grandaj maŝinoj ne nur rapidigas la konstruadon, sed ankaŭ garantias ĝian kvaliton. La registara departemento komisiis al kvalito-kontrolistoj ekzameni la konstruadon. Intensiĝis ankaŭ la konstruado en la lokoj por reteni kaj defluigi superakvon. Unuflanke, pliigi vojojn kaj pontojn por defluigi inundon, plialtigi kaj plifortikigi ĉefajn digojn; aliflanke, rekonstrui kaj rearanĝi loĝdomojn de la loĝantoj sufer-

intaj de inundo, konstrui sekurajn terasojn laŭlonge de la digoj por ke ili servu kiel rifuĝejoj de la loĝantoj eventuale suferontaj de inundo.

Kiel akvoutiliga fakulo, Zhang Shengpeng diris, ke li estas kontenta pri ĉi-jara akvoutiliga konstruado kaj havas plenan fidon por la kapableco de la digoj kontraŭ inundo, kia tiu en 1998.

Samtempe estas efektivigata nun la plano nuligi ĉiujn polderojn. Pli ol du milionoj da loĝantoj, kiuj vivas en malaltaj lokoj borde de Yangzi-rivero kaj multe suferis de inundo, transloĝiĝos en sekurajn lokojn en la venontaj 3-5 jaroj. Antaŭ la pluva sezono de la kurranta jaro 940 mil loĝantoj de la meza baseno de Yangzi-rivero enloĝiĝis en novajn loĝdomojn. Parton de la polderoj oni redonis al la lagoj, kaj ĝia plej granda parto estas destinita por defluigi inundon kaj konservi akvon en inundaj jaroj. Efektivigo de la plano pluapaŝe harmoniigos la rilatojn inter la homoj kaj naturo kaj garantios la senĉesan disvolviĝon de ekonomio en la menciitaj lokoj. ■



Plifortikigo de digo

Ĉinio kaj akvomanko

- Akvomanko malhelpas la disvolviĝon de la ĉina ekonomio
- Strategio de la ĉina registaro: serĉi novan akvofonton kaj ŝpari akvon samtempe
- Konsiloj de specialistoj: fluigi sudan akvon norden, praktiki akvoŝparan agrikulturon, akiri subteran akvon per sunenergio, utiligi marakvon...

de PANG NAIYING

ĈINIO okupas la 6-an lokon en la mondo pro tio, ke ĝi posedas 8% de la akvo de la mondo, dum ĝia pokapa posedo de akvo okupas la 109-an, kaj ĝi estas unu el la 13 akvomankaj landoj enlistigitaj de UN.

Akvo de Ĉinio estas malmulta kaj dislokiĝas malracie: 80% de la akvo troviĝas en la baseno de Yangzi-rivero kaj sude de la baseno; dum la vasta areo norde de Yangzi-rivero, kie troviĝas du trionoj de la agraro kaj duono de la loĝantaro de la lando, okupas nur 20% de la akvo de la lando. La pokapa posedo de akvo en la basenoj de Haihe- kaj Luanhe-riveroj estas nur 357 kubmetroj, malpli multe ol tiu en la tipaj akvomankaj landoj.

Serioza akvomanko vekis zorgon de la ĉina registaro kaj la tuta socio. Marte de 1999 okazis la Dua Sesio de la Naŭa Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco (ĈPPIK), kaj dum la sesio multaj membroj de la Tutlanda Komitato de ĈPPIK, kiuj prenis sur sin la devon de "partopreno en kaj interkonsiliĝo pri politikaj aferoj", prezentis konsilojn pri solvo de serioza

akvomanko de Ĉinio. El iliaj konsiloj parto estas daŭre ekzamenata, parto — efektivigata, kaj parto — akceptita en planon.

KIEL EBLE PLEJ FRUE FLUIGI SUDAN AKVON NORDEN

Yangzi-rivero enfluigas en la maron meznombro 960 miliardojn da kubmetroj da akvo ĉiujare, kaj eĉ en seka jaro almenaŭ 600 miliardojn. Ĉu oni povos irigacii sekan nordon per akvo el Yangzi, tio estis plej multe konsiderata dum la lastaj dekoj da jaroj por akvofonta ekspluatado. Oni nomas tiun konsideron "fluigi sudan akvon norden".

Antaŭ dek jaroj rilate "fluigi sudan akvon norden" oni havis tri projektojn: orientan, mezan kaj okcidentan. Parto de la orienta projekto estis plenumita en la provincoj Jiangsu kaj Shandong, kaj tio jam multe disvolvis la ekonomion de la norda parto de Jiangsu-provinco. La meza kaj okcidenta restis nominalaj pro manko de kapitalo kaj necesa tekniko.


La nordo de Ĉinio nun suferas de serioza akvomanko. Komence de la 80-aj jaroj multaj fabrikoj en Pekino, Tianjin kaj aliaj grandaj urboj ĉesigis sian produktadon pro

manko de akvo. Troa eltiro de subtera akvo kaŭzis en Hebei-provinco pli ol 30 subterajn funelojn kun totala areo de 20 mil kvadrataj kilometroj, sekve okazis malleviĝo de la tersurfaco, entrudiĝo de marakvo kaj alkaliĝo de kampoj. En tia situacio oni refoje metis la "mezan projekton" en la tagordon. S-ro Liang Jiyang, akademiano de la Ĉina Akademio de Sciencoj, sin okupanta pri studo de akvofonto kaj akvomedio, diris, ke la detruita ekologia medio estas neriparebla, tial oni devas kie eble plej frue efektiviĝi la "mezan projekton", alie nenio helpos, kiam venos senakva periodo en la 21-a jarcento.

"MEZA PROJEKTO": METODO KONTRAŬ SEKIĜO DE LA FLAVA RIVERO

La Flava Rivero, kiu longas 5 464 kilometrojn kaj trafluas 9 provincojn, estas la dua granda rivero de Ĉinio kaj lulilo de la ĉina nacio. En la lasta duonjarcento, dank' al la akvoadministrado la sekureco de la popolo en la ofte inundata regiono estis garantiata, kaj stabile disvolviĝas la socia ekonomio de la loko.

Sed ekde 1972 ofte senakviĝis la rivero. Ekzemple en 1997 700-kilometra parto de la Flava Rivero senakviĝis, kio serioze damaĝis la industrion kaj agrikulturon, kaj la popolo foje eĉ ne povis akiri trinkakvon. Pro tio delegacio gvidata de s-ro Zhang Qia, vicprezidanto de la Komisiono de Loĝantaro,



Riĉfonto kaj Medio, esploris laŭlonge de la rivero kaj trovis, ke la akvokvanto de la Flava Rivero estas nur deksepono de tiu de Yangzi, sed ne estis signo de sekiĝo en la pasintaj dekoj da jaroj, kaj senakviĝon kaŭzis homoj: en la 50-aj jaroj loĝantoj de la baseno de la Flava Rivero meznombro posedis 1 300 kubmetrojn da akvo, pli multe ol 1 000 kubmetroj, la minimuma bezono por la homa ekzisto. Sed nun tie la loĝantaro estas 2.25-oble kiom tiu en la 50-aj jaroj, kaj en 2030 la loĝantaro kreskos je triono. Laŭlonge de la rivero oni instalas tro multajn akvopumpejojn por eltiri akvon el la rivero, kaj la kvanto de la eltirita akvo terure superis tiun de la perme-sata. Specialistoj opinias, ke la radikala rimedo kontraŭ senakviĝo de la Flava Rivero estas laŭleĝe uzi akvon, disvolvi laŭ akvolivera kapablo, fluigi sudan akvon norden kaj praktiki akvoŝparan agrikulturon.

PRAKTIKI AKVOŜPARAN AGRIKULTURON

Nun Ĉinio bezonas 565 miliardojn da kubmetroj da akvo, kaj 73% de la akvo estas uzata de la agrikulturo. Dum longa tempo la 53 milionoj da hektaroj da kampoj estis irigaciataj per tradicia metodo de "ĝenerala akvumado", kaj 60-70% de la akvo aŭ tralikiĝis aŭ vapor-iĝis. Fine de la 80-aj jaroj kaj komence de la 90-aj jaroj Ĉinio provis akvoŝparan agrikulturon, kaj 3.3 milionoj da hektaroj da kampoj estis irigaciataj per akvoŝprucigo aŭ

akvogutigo. Aperis 300 akvoŝparaj gubernioj.

En la subprovinco Cangzhou de Hebei-provinco oni alprenis scien-can metodon, kiu efike haltigis la malleviĝon de la subtera akvo ĉiujare je du metroj kaj ŝparis ĉiujare 500 milionojn da kubmetroj da akvo, kiom la akvokvanto de kvin grandaj akvorezervejoj. Se duono de la agraro de la ebenaĵoj en la basenoj de la Flava Rivero kaj Huaihe-rivero estos irigaciata per tiu metodo, oni povos ŝpari ĉiujare 12 miliardojn da kubmetroj da akvo.

En la seka Gansu-provinco de la nordokcidenta parto de Ĉinio oni konstruis kelojn por konservi pluvakvon. Dank' al tiu metodo la hektara produktokvanto en tiu loko, kie la jara precipitaĵa kvanto estas malpli ol 300 milimetroj, atingis 7.5 tunojn. Fakuloj diris, ke la diversaj pavimitaj vojoj en la nordo de Ĉinio havas grandan areon por kolekti pluvakvon. Se asfaltita ŝoseo kun larĝeco de 30 metroj estos konstruita samtempe kun akvokolektaj keloj, ĉiukilometra ŝoseparto povos kolekti 9 000 tunojn da akvo, kalkulate laŭ la jara precipitaĵa kvanto de 300 milimetroj. Tial oni urĝe bezonas disvastigi akvoŝparan inĝenierion.

"OKCIDENTA PROJEKTO": AKIRI AKVON PER SUNENERGIO

En la okcidento de Ĉinio sterniĝas vasta dezerto, kaj sekegeco daŭre dezertigas kampojn de la loko. S-ro Lu Qiang, akademiano de la Ĉina Akademio de Sciencoj, diris, ke fakte al la okcidento de Ĉinio ne mankas akvo. Li ekzemplis per Xinjiang, kiu konsistigas sesonon de la teritorio de la lando. En Xinjiang rezerviĝas 115 miliardoj da kubmetroj da akvo, duoble kiom la akvokvanto de la Flava Rivero. Sed plejparto de la akvo rezerviĝas profunde sub la tero. Se oni eltiras la subteran akvon, certe la dezerto fariĝos bonaj kampoj. Sendube tio postulas energion. Estas feliĉe, ke tie la sunenergio estas neelĉerpebla, ke la jara sunradiado egalas al 1 800 kilovatthoroj da elektro ĉiukvadratmetre.

Nun oni povas apliki la teknikon de la ŝtata laboratorio gvidata de Lu Qiang pri akiro de profunda subtera akvo per sunenergio. La tiamaniere akirita akvo estas malpli kara ol la tubakvo en urboj. Kaj krome, tia utiligo de sunenergio ne poluas akvon nek konsumas neregenerajn riĉfontojn, tial oni nomas tian akvon "nepoluita energio". Pro tio Lu Qiang esperas, ke la ŝtato investos 100 miliardojn da juanoj por turni ĉ. 3 milionojn da hektaroj da seka tero en oazon.

"ORIENTA PROJEKTO": REKTE UTILIGI MARAKVON

La orienta apudmara regiono estas la plej evoluanta kaj plej dense loĝata en Ĉinio. Tie la bezonata akvokvanto estas la plej granda. Statistiko montras, ke la totala produktokvanto de la regiono kun 400 milionoj da loĝantoj konsistigas 61% de tiu de la lando. Sed tie pli kaj pli streĉiĝas la akvolivero, kio malhelpis la daŭran disvolviĝon de la ekonomio de tiu regiono. Tial antaŭ dekoj da jaroj industriaj entreprenoj en iuj apudmaraj urboj jam memvole anstataŭigis sensalan akvon per marakvo.

Por resumi kaj disvatigi la sperton de tiuj urboj, specialista enketa grupo gvidata de s-ro Yan Hongmo, specialisto de la Ŝtata Oceanografia Buroo kaj membro de la Tutlanda Komitato de ĈPPIK, faris enketadon pri "rekta utiligo de marakvo" en apudmara regiono. Li diris, ke du teknikaj problemoj de rekta utiligo de marakvo, nome tiu kontraŭ korodo kaj tiu kontraŭ alkroĉiĝo de vivaj estaĵoj, jam estis solvitaj, kaj oni rimarkinde profitis de tio. Ekzemple en 1997, 12 entreprenoj en Qingdao anstataŭigis sensalan akvon per marakvo en cirkula malvarmigo, kaj la kvanto de la utiligita marakvo egalas al kvarono de la totala sensala akvo liverata de la urbo, dum la bezonata mono estis nur 46% de tiu bezonata de malvarmigo per sensala akvo. Sur Shengshan-insulo de Zhejiang-provinco oni instalas ekipaĵon de marakvo-sensaligo por solvi la problemon de trinkakvo de la insulanoj.

S-ro Yan Hongmo diris, ke rekta utiligo de marakvo estas aplikata en multaj landoj, kaj en Ĉinio oni utiligas nur 6 miliardojn da kubmetroj da marakvo, kaj la latenta forto en tiu flanko estas tre granda. Li konsilis al la ŝtato kiel eble plej baldaŭ ellabori politikon kaj leĝon pri utiligo de marakvo, apliki marakvo-utiligon en industrio, agrikulturo kaj la popola vivo kaj laŭeble transloki en apudmarajn urbojn la entreprenojn postulantajn grandan kvanton da akvo.

Kiel statas la suda landparto en tiu flanko? Parolante pri la kialoj de la inundo de Yangzi-rivero en 1998, s-ro Zhu Bofang, akademiano de la Ĉina Inĝenieria Akademio kaj specialisto pri akvoadministrado, diris, ke la tro rapide pufiĝanta loĝantaro kaŭzis batalon inter la loĝantaro en la supra baseno de la rivero kaj la arbaro pri tero kaj batalon inter la loĝantaro en la meza kaj malsupra basenoj de la rivero kaj akvo pri tero. En la lastaj pli ol 40 jaroj, polderiga-

do ebenigis pli ol 1 100 lagojn. Tio multe reduktis la povon de la riveroj kaj lagoj enlasi superakvon. Evidente akvoadministrado devas efektiviĝi samtempe kun naskolimigo, arbarizado kaj reapero de lagoj.

La konsiloj de la membroj de la Tutlanda Komitato de ĈPPIK estis alte taksataj de la decidofara gvidantaro de la ŝtato kaj fariĝis gravaj apogpunktoj en decidofaro de la registaro. La konsiloj estis eldonitaj en du dokumentoj "Raporto de enketado pri la akvoproblemo de Ĉinio" kaj "Programo pri la akvoadministrativa disvolviĝo de Ĉinio en la komenco de la 21-a jarcento". Parto de la konsiloj estas akceptita, ekzemple la Ŝtata Konsilio jam sankciis fondon de "Ŝtata Kabineto pri Akvoŝparo". Ĉi tiu prizorgas unuecan direktadon kaj administradon de efika utiligo de akvo en la lando, por kiel eble plej baldaŭ fini la situacion de tradicia senorda kaj malŝpara uzado de la akvo, kaj revizio de la malnova "Leĝo de

Akvoadministrado" estis enmetita en la tagordon de leĝofarado de la Tutlanda Popola Kongreso.

Samtempe kun tio la Akvoadministrativa Ministerio de Ĉinio estas sin preparanta por fondo de kompleta kaj scienca projekta sistemo de akvoadministrado kaj por ellaborado de serio da efikaj metodoj por trovi novan akvofonton kaj ŝpare uzi akvon, kiu inkluzivas ĝeneralan reordigadon de riveroj, lagoj kaj akvorezervejoj de la lando, por altigi la povon de defendo kontraŭ inundo kaj plibonigi la ekologian medion; komplete reformi la irigacian areon de 53 milionoj da hektaroj kaj popularigi akvoŝparan konstruadon; konstrui novajn akvoadministrajn instalaĵojn por solvi la problemon de serioza akvomanko de Ĉinio... En Ĉinio alia gravega laboro por solvi la seriozan akvomankon estas eduki la popolon, ke ili konsci la krizan staton de akvomanko kaj memvole ŝparu akvon. ■

Putoj kolektantaj pluvakvon



Poemoj

ADIAŬO VI MIAJ LEGANTOJ

de Jirí Karen (Ĉeĥio)

*Kiu mi estis Por kio mi vivis
tion al mi diros mia verko
Kelke da miaj piedsignoj
vi trovos en ĉemara sablo*

*kie la rozoj floras
kie malamo foras
tie vi trovos min*

*Al miaj kritikistoj mi diras
— Neniam mi proklamis
ke mi verkis poemojn
mi skribis nur en vortoj
la ofte realan nerealon*

*kaj vin mi petas Ĥarono
/mankas al mi draĥmo/
de mi eĉ obolon vi ne ricevos
Por malriĉulo el oriento
tiuj valutoj estis
tro multekostaj*

SORTO

de Oleg Vasiljev (Rusio)

*Kunigis sorto nin hazarde
Kun Vi iam, la karulin’;
Vi estas por mi deziranta
Mi per animo amas Vin.*

*Ja kvazaŭ bela, hela stelo
Brilegas Vi dum mateniĝ’,
Sed sur vastaĵo de ĉielo
Sunet’ Vi estas post vekig’.*

*Dum sonĝo estas Vi reĝino,
Belega, svelta kaj sub kron’,
Modesta, ĉarma junulino
solene sidas sur la tron’.*

*Mi scias, ke Vi loĝas fore,
Mil futoj estas sur la map’,
Kiam mi fartas tre, tre sole
Mi revas pri Vi sur kanap’.*

*Kiel ĉarmega, pompa rozo
Ornamis koron ĝis la fin’,
Per versoj, ankaŭ per prozo
Mi dankas tre pro ĉio Vin.*

PAMPELMUSFLOROJ

de Feniksa (Hoang Minh Phung)
(Vjetnamio)

*Printempo afekcion disŝutas
Sur pampelmusflorojn ĉielangulon
parfumanta
Ekde tiam malproksime vi forestas
Ĉiam suke verdiĝas folioj, ĉielo ĉiam
odoranta*

*Viaj manoj ofte prizorgas
Dorlotante de ONKLO pampelmus-
arbon*

*Tra la folioj vento susuras
En vian leteron alportante parfumon*

*La butono en nokto blankiĝas
Kiel blua stelo lumante mian sojlon
Portanta bonodoron de pampelmus-
folioj
Via hararo onde fluas sur viaj ŝul-
troj*

*Kiel bonodoras la intimaj konfesoj
karesante
La pampelmusarbon de Onklo ŝatante
La hejmlandan spiriton adorante*

Anonco

Por faciligi la vojaĝon de EPĈ-legantoj kaj aliaj esperantistoj el diversaj landoj en Ĉinio, ĉu turisme ĉu partoprenante en E-renkontiĝoj, la distribua fako de EPĈ-redakcio volonte servas ankaŭ por aranĝi loĝon, manĝon kaj vizitadon de persono kaj grupo en Pekino kaj aliaj lokoj de Ĉin-

io, donante kiel eble plej favoran prezon kaj Esperantan ĉiĉeronon. Pri detaloj kaj itineropetoj kontaktiĝu kun s-ro Wang Ruixiang, distribua fako de EPĈ, P.O. Kesto 77, 100037 Beijing, Ĉinio; telefonnumero kaj telefakso: 86-10-68321808; ret-poŝto: epc@china-report.com

Ŝanĝiĝoj en 50 jaroj (I)

La 1-a de oktobro ĉi-jare estos la 50-a datreveno de la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Kiaj ŝanĝiĝoj okazis en tiuj 50 jaroj? Ni publikigos artikolojn kun fotoj kaj datenoj por konigi la socian kaj ekonomian disvolviĝon de Ĉinio. Kvankam Ĉinio akiris impetan disvolviĝon, tamen pro sia granda loĝantaro kaj malforta ekonomia bazo ĝi staras ankoraŭ malantaŭe de la evoluintaj landoj. Ni esperas, ke niaj artikoloj helpos niajn legantojn pli bone koni la ĉinan konstruadon.

La Red.

de WANG HANPING

ONI ofte priskribas Ĉinion en 1949 per la vortoj “malriĉa kaj blanka”. Tiam Ĉinio estis lando plena de militaj vundoj, 90% de ĝiaj loĝantoj vivis en la kamparo kaj ĝia industria produkt valoro konsistis nur 12.6% de la nacia produkt valoro. La malnova Ĉinio estis subevoluinta ekonomie kaj la tradiciaj agrikulturo kaj metiindustrio okupis gvidan lokon, tamen ilia produktado estis postĝinta. En terkulturado oni ne uzis maŝinon, nek elektron nek kemian sterkon kaj la greno ne sufiĉis por nutri la loĝantojn, dum la vasta kamparanaro vivis mizeran vivon. Tiam la ĉina industrio estis ĉefe la malpeza kun nur malmulte da fakoj produktantaj varojn sole por konsumado. Tiam la produktokvantoj de ŝtalo, nafto kaj elektro de Ĉinio egalas nur kelkdekonojn aŭ kelkcentonojn de tiuj de la evoluintaj landoj kaj tiun, kiun ĝi havas en unu aŭ du tagoj en la nuna tempo.


La fondiĝo de la popola respubliko en 1949 finis la duonkolonian kaj duonfeŭdan historion de Ĉinio, kaj 400 milionoj da ĉinoj suriris la vojon de paca konstruado. En la sekvantaj 30 jaroj Ĉinio stari-



Subĉiela karbominejo en Ŝanxi-provinco

gis sendependan kaj ĉioamplaksan naci-ekonomian sistemon garanti- antan ĝian vivon kaj disvolviĝon malgraŭ tio, ke pro naturaj katastro- foj kaj gravaj mispaŝoj iatempe pli- grandiĝis la diferenco inter ni kaj la evoluintaj landoj. En 1978 la ĉina agrikulturo atingis kompletan dis- volviĝon en terkulturo, forstokul- turo, brutobredado, flankokupo kaj fiŝbredado kaj ĝia produktovaloro triobliĝis, dum la produktovaloro de la moderna industria sistemo 40- obliĝis kompare kun tiu en 1949.

En 1978 Ĉinio realigis sian alian historian turniĝon. En tiu jaro ĝi ekpraktikis la politikon de refor- mado kaj pordmalfermo, kiu estas tre utila al rapida ekonomia dis- volviĝo de Ĉinio. En la pasintaj 20 jaroj la ĉina ekonomio kreskis meze je 9.8% ĉiujare kaj Ĉinio fariĝis la plej granda grenprodukta lando kaj per tio ĝi solvis problemon de manko de greno. Ĉinio okupas la unuan lokon ankaŭ en produktado de ŝtalo, karbo, cemento, vestoj, televidiloj kaj aliaj. Kaj hodiaŭ la produktovaloro de ĝiaj sekundara kaj terciara industrioj konsistigas pli ol 80% de la nacia enspezo. Nun la ĉina ekonomio atingis la unuan etapon de industriigo kaj la tuta mondo vidas la viglan kaj rapide disvolviĝantan Ĉinion. ■



En Jungar-elektrejo en Interna Mongolio

Produktokvanto de ĉefaj industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj

	1949	1978	1998
ŝtalo (mil tunoj)	158	31 780	115 590
karbo (mil tunoj)	32 400	618 000	1 250 000
petrolo (mil tunoj)	120	104 100	161 000
elektro (miliardoj da kWh)	4.3	256.6	1 167
greno (mil tunoj)	113 200	304 800	490 000
kotono (mil tunoj)	445	2 167	4 400

REFORMADO DE TELEKOMUNIKADO

de YOU DIAN

EN la lasta tempo telekomu- nikado estis multe atentata en Ĉinio. Oni donis atenton ĉefe al ŝanĝo de la telekomunika tarifo kaj reformado kaj reorgani- zado de la telekomunikaj establoj.

Marte de 1999 la Ministerio de Informa Tekniko kaj Telekomuni- ka Industrio (antaŭe la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio) de la Ĉina Popola Respubliko decidis


mallevi la prezon por la unuafoja instalo de ordinaraj telefonoj kaj por enretiĝo de poŝtelefonoj, kio estis tre bonvena al la vasta pu- bliko kaj faris sensacion en la mer- kato. Oni diris, ke dank' al tio ie en Ĉinio aperis furoro de instalo de telefonoj. Tamen estis ankoraŭ granda distanco inter la propagan- do de granda prez-malleviĝo kaj la deziro de la popolo, tial la gaze- taro plurfoje publikigis artikolojn por montri malkontenton. Iuj eĉ

opiniis, ke la konsumantoj nun pagas por telekomunikado preskaŭ same multe kiel antaŭe.

Multaj atribuas la altan prezon kaj malbonan servon de la ĉina telekomunikado al ĝia monopoli- go. Jam en la komenco de la refor- mado la ĉina registaro prenis tele- komunikadon kiel fundamentan industrion, kiun oni devas unue disvolvi. Tiam la ĉina registaro komisiis la telekomunan depar- tementon respondeci pri konstru-

ado kaj entreprenado de la tutlanda telekomunikado, tamen pro la malforta fundamento, malgranda kapitalo kaj granda bezono en konstruado de la telekomunika reto, dum longa tempo oni pagigis multe por la ĉina telekomunikado. Tiu politiko garantiis la konstante rapidan disvolvon de la ĉina telekomunikado, kiu fariĝis unu el la ĉinaj entreprenoj, kiuj disvolviĝis plej rapide en la lando. Ankaŭ la ordinaraj ĉinoj ĝuis la ŝanĝiĝon de la rapida disvolviĝo de la telekomunikado. Nun telefono, kiu estis tre rara antaŭ dekelkaj jaroj, vidiĝas en la hejmo de ordinaraj ĉinoj, kaj poŝtelefono, rigardata kiel luksaĵo, estas uzata de 20 milionoj da homoj (en 1998 duoble kreskis la nombro).

La monopoligo de la ĉina telekomunikado malkontentigis pli kaj pli multe da klientoj pro manko de konkurenco kaj malbona servo, kaj iuj klientoj akuzis pri telekomunika servo. Precipe en 1998 oni pli kaj pli forte deziris reformi telekomunikadon. Ĝuste antaŭ la ĉi-foja prez-malleviĝo la Ministerio de Informa Tekniko kaj Telekomunika Industrio publikigis sian projekton reformi kaj reorganizi la telekomunikajn establojn en Ĉinio. Laŭ la projekto la ĉinaj telekomu-



En la Pekina Centralo de Longdistanca Telefonio

nikaj entreprenoj apartenas respektive al 4 kompanioj, nome kompanio de fiksa reto, tiu de poŝtelefono, tiu de sendrata televoĉado kaj tiu de satelita telekomunikado. Tiuj 4 kompanioj kaj la antaŭe fondita Ĉina Liantong-kompanio kaj aliaj kompanioj kune stimulas fakan konkurencon. Samtempe kun tio, stabile progresis la pordmalfermo de la telekomunika merkato de Ĉinio. Antaŭ nelonge Ŝanhajo kaj iu usona kompanio subskribis kontrakton pri kuna investo de la telekomunika-

do de Pudong-distrikto, Ŝanhajo.

Ĉu reorganizado ĉu pordmalfermo de la ĉina komunikado, ili ĉiuj celas rompi la monopoligon kaj akceli konkurencon. La ĉina telekomunikado nur antaŭ nelonge komencis sian reformadon kaj kompreneble ankoraŭ ekzistas neraciaj faktoroj, kiuj malhelpas la justan konkurencon, sed la ĉina telekomunikado jam komencis sian unuan paŝon, firman kaj stabilan. Ĉiuj malkontentoj je la nuna stato akcelos la senĉesan reformadon de la ĉina telekomunikado. ■

KURANTAJ AFEROJ

● La Ĉina Popola Banko decidis nuligi la regionan limigon de la filioj de eksterlandaj bankoj en Ĉinio. De nun eksterlandaj bankoj povas fari sian financan laboron en ĉiuj centraj urboj, sed antaŭe nur en Pekino, Ŝanhajo, Tianjin, Shenzhen kaj aliaj 19 urboj kaj Hainan-provinco. La Ĉina Popola Banko daŭre kompletigos la regulojn, por ke la eksterlandaj bankoj prove entreprenu la laboron pri la ĉina mono *Renminbi*.

● En Taklimakan, nomata "Maro de Morto", ĉinoj ne nur stariĝis grandan petrolan bazon, sed ankaŭ plantis 60 000 tamarikojn taŭ-

gajn por dezerto kaj konstruis 10.6 hektarojn da verdejoj kaj unu hektaron da arbidejo, kiu ĉiujare kulturas 500 000 arbidojn. Krome, oni sukcese kulturis ankaŭ tomaton kaj kukumon, ke la "Maro de Morto" ekhavis vivaĵojn.

● Ĉinio sukcesis en elektroproduktado per riz-ŝeloj kaj tiu tekniko nun estas vaste aplikata en Fujian-provinco.

Per tiu nova tekniko oni transportas riz-ŝelojn en gasigan fornon, por ke ili ne komplete brulu, kaj pere de ŝanĝo de la kvanto de enblovita aero ili produktas bruligeblan gason. Post malvarmiĝo kaj filtriĝo la purigita gaso eniras en

generatoraron kaj tie transformiĝas en elektron. La uzitaj riz-ŝeloj post filtriĝo povas esti uzataj por sterki kampojn.

● En la lastaj jaroj en Cangzhou, regiono ĉe Bohai-maro, privataj entreprenoj produktis multe da bonkvalitaj varoj. El ili la Xinhua-a Kabla Kompanio Limigita subskribis kontrakton kun la nuklea elektrejo Dayawan por liveri al ĝi kablون kun valoro de 20 milionoj da juanoj. Tio markis novan etapon en la historio de produktado de nuklea elektro de Ĉinio, ke ĝi uzas sian propran kablون. En ĉina satelito estas ankaŭ cirkvita plato, farita en Cangzhou.

ĈINIO

● La Norda Politekniko de Ĉinio fondis en aprilo E-kurson, kiun vizitas 7 studentoj de la fako de moderna sekretariado. La kursanoj partoprenas en la monata kunsido de la Pekina Esperanto-Asocio. (Xiao Huoli)



Instruisto kaj lernantoj de la E-kurso en la Norda Politekniko de Ĉinio

● La Ministerio de Informa Teknika kaj Telekomunika Industrio de Ĉinio emisiis en la 1-a kaj 18-a de majo poŝtmarko-seriojn "La Monda Hortikultura Foiro Kunming, 1999" kaj "Ruĝa Cervo". La Filatela Kompanio de Haikou de Hainan-provinco lanĉis stampilon kun Esperanto kaj la ĉina lingvo. La stampon desegnis s-ro Zhang Linrui. (Zhang Linrui)



La stampoj uzitaj de la Filatela Kompanio de Haikou de Hainan-provinco



AŬSTRIO

● La 17-an de aprilo 1999 okazis Zamenhof-festo en la Pola Instituto en Vieno, Aŭstrio. Ĉeestis 40 personoj el Aŭstrio, Belgio,

Hungario, Indonezio kaj Pollando. (Walter Klag, Ret-info)

EGIPTIO

● Kadre de la kampanjo lanĉita de UEA, du prelegoj pri Esperanto estis faritaj ĉe la lokaj grupoj de Rotario Internacia, je la 3-a de marto 1999 en la franca klubo kaj je la

24-a de marto 1999 ĉe la angla klubo en Aleksandrio, Egiptio. (Guy Penet, Ret-info)

GERMANIO

● La 21-a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj okazos la 7-14-an de aŭgusto 1999, en Przytok apud Zielona Gora en Pol-

lando. Tien venos nur denaske Esperante edukataj infanoj kun siaj gepatroj. Pro la internacieco krokodilado ne funkcias. Poste samloke okazos la Familia Feriado ankaŭ por nedenaskuloj. Kontakto: Christoph Knabe, Dortmund Str. 9A, DE-10555 Berlin; <http://www.tfh-berlin.de/~knabe/REF.html>; <knabe@tfh-berlin.de>.

(Christoph Knabe, Ret-info)

KROATIO

● Dum sia kunsido, kiu okazis la 30-an de marto 1999, la urbaj instancoj de Naŝice en la kroata regiono Slavonio decidis nomi novan straton apud la Elementa

Lernejo Reĝo Tomislav la Strato de Mavro Ŝpicer. Mavro Ŝpicer estas unu el la fondintoj de la kroata Esperanto-movado, aŭtoro

de la unua lernolibro de Esperanto en la kroata lingvo, kunredaktoro de la unua kroata Esperanta gazeto "Kroata Esperantisto" kaj kompilinto de la unua kroata Esperanta antologio. Li naskiĝis en Naŝice la 1-an de aprilo 1862. La urbo honoris lian nomon kaj liajn meritojn pri Esperanto okaze de la Tria Kongreso de Kroataj Esperantistoj en la regiono Slavonio, sed ankaŭ renkonte al la jaro 2001, kiam UK okazos en Zagrebo.

(Spomenka Ŝtimec, Ret-info)

POLLANDO

● La dua sesio de Interlingvistikaj Studoj okazis la 8-13-an de februaro en la Lingvistika Instituto de Universitato Adam Mickiewicz (Poznan, Pollando). La gestudentoj el diversaj landoj aŭskultis prelegojn pri problemaro kaj historio de interlingvistiko; pri bazaj nocioj en morfologio kaj sintakso; pri la dua periodo de E-literaturo kaj pri Esperanta gramatiko. En la sekva studjaro (unua sesio 19-24.09.1999), UAM denove atendas novajn aliĝontojn (aliĝdato: 15-a de aŭgusto). Interesiĝantoj turnu sin al I. Koutny: Lingvistika Instituto, UAM, Miedzzychodzka 5, PL-60-371 Poznan, T/F:+48-61 8 6 1 - 8 5 - 7 2 ; r e t e : ikoutny@amu.edu.pl.

(Ilona Koutny)

UKRAINIO

● Apud ĉarma germana urbo St. Andreasberg okazis la 15-a Printempa Semajno Internacia. Enkadre de ĝi okazis la 5-a Printempa Lernejo Internacia. La aranĝo allogis pli ol 160 personojn el 21 landoj. Ĝi fakte estis "Paska renkontiĝo por la tuta familio" — en tiu kvanto estas kaŝitaj 34 familioj. Dum la tuta aranĝo regis vere familieca etoso.

(Mikaelo Lineckij, Ret-info)

Sindediĉo al Esperanto

de CHENG JI

S-RO Bao Shujun, delegito de UEA, honora konsilanto de la Ĉina E-Ligo kaj prezidanto de la Ningbo-a E-Asocio, estis ĉefinĝeniero de la Ningbo-a Lako-fabriko. Emeritiĝinte, li laboris plenenergie por Esperanto. Li ofte diris: "Lako-farado estas mia okupo kaj Esperanto — mia dumviva kariero."

ESPERANTISTIĜO ANTAŬ 50 JAROJ

Je la unua vido mi neniel povis kredi, ke li aĝas jam pli ol 70 jarojn. Kun larĝa frunto kaj brilaj okuloj li profunde impresis min per siaj prudenteco kaj granda animo. En lia legoĉambro troveblas multaj Esperantaĵoj: E-memorinsignoj, E-gazetoj, E-leteroj... Ĉiuj tiuj objektoj estas kolektitaj de li mem.

Li rakontis al mi pri sia konatiĝo kun Esperanto antaŭ pli ol 50 jaroj:

"Mi naskiĝis en Ningbo, Zhejiang-provinco. Diplomiĝinte el la Hujiang-a Universitato en Ŝanhajo en 1945, mi eklaboris en lako-fabriko. Iutage en 1949 mi informiĝis de ĵurnalo, ke la disaŭdiga E-kurso de la Ŝanhaja E-Asocio varbis lernantojn, kio vekis mian atenton. Kun scivolemo mi anoncis min al la kurso. En la 1-a de septembro la radio-stacio ekdonis la lecionojn kaj mi ilin sekvis ĉiutage. Ĉe la fino de oktobro finiĝis la kurso kaj mi havis honoron paroli en Esperanto je la nomo de la kursanoj en la ferma ceremonio. Poste mi laboris kiel kursgvidanto."

Kiam li menciis pri tio fiero vidiĝis sur lia vizaĝo.

Aliĝinte al la Ŝanhaja E-Aso-

cio, li entuziasme partoprenis en ĉiuj ĝiaj aktivadoj. Poste li estis elektita kiel konsilanto kaj vicprezidanto de la asocio. Marte de 1951 li vojaĝis al Pekino por ĉeesti la fandan kunvenon de la Ĉina E-Ligo kaj aliĝis al ĝi. En la kunveno Hujucz kaj aliaj veteranaj esperantistoj faris paroladojn. De tio li pli multe konis la celon kaj signifon de Esperanto kreita de L. L. Zamenhof kaj rolon de Esperanto en internacia komunikado. Post tio plifirmiĝis liaj fido kaj decido multe kontribui al E-movado.

PROGRESIGI E-MOVADON

En 1960 li venis en la Kunming-an Ĝeneralan Lako-fabrikon en Yunnan kaj laboris tie pli ol 24 jarojn. En 1979 li partoprenis en la Dua Labor-kunsido de Esperanto okazigita de la Ĉina E-Ligo en Pekino kaj estis elektita kiel ĝia konsilanto. Reveninte en Yunnan, li kune kun aliaj esperantistoj fondis la Yunnan-an E-Asocion kaj laboris kiel ĝia vicprezidanto.

Ĉiufoje kiam li vizitis sian hejmlokon Ningbo, li certe kontaktis lokajn esperantistojn. Post kiam li eklaboris en la hejmloko en 1984, li aktive preparis la Ningbo-an E-Asocion. Post ĝia fondiĝo li entuziasme okazigis diversajn aktivadojn por disvastigi Esperanton: funkciigi diversajn E-kursojn, starigi E-angulon en parko, k.a.

En 1988 li emeritiĝis. Tio permesas al li doni sian tutan energion al disvastigo de Esperanto. En 1989 li projektis kun aliaj memorkoverton, okaze de la 130-a datreveno de la naskiĝo de L. L.

Zamenhof kaj de la 4-a jariĝo de la Ningbo-a E-Asocio. Emisio de la memorkovertoj multe ĝojigis lin. Tamen, kiam en- kaj eksterlandaj esperantistoj ĝuis tiun belan memorkoverton, neniu el ili sciis, ke por ĝia emisio li riskis sian monon: Ne volante respondi por eventuala neaĉetado de la memorkovertoj, la Ningbo-a Poŝtmarka Kompanio prenis sur sin certan riskon, ke li prenu la taskon vendi mil me-



S-ro Bao Shujun

memorkovertojn. Oni povas diri, ke lia duonjara klopodo por la memorkoverto estis rekompencita de ĝia emisio, kaj li ege ĝojis ankaŭ pro tio, ke la du memorigaj poŝtstampoj kun Esperantaj vortoj sur la memorkoverto estis enlistigitaj en la unua numero de "La Verda Lupeo", organo de Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj en 1990.

POR KE PLI MULTAJ KONU NINGBON

S-ro Bao esperas konigi per Esperanto Ningbon

kaj Ĉinion al pli multaj eksterlandanoj kun la celo akceli ekonomian kaj kulturen interŝanĝojn inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

En 1992 s-ro Bao kaj aliaj eldonis la Esperantan broŝuron "Bonvenon al vi en Ningbo". Ili kunportis 300 ekzemplerojn al la Kvina Pacifika Kongreso de Esperanto kaj donacis ilin al la kongresanoj. Por eldoni ĝin s-ro Bao vizitis ĉiujn presejojn en Ningbo, sed neniu el ili povis komposti pro manko de kelkaj Esperantaj tipoj. Do, lia filino tajpis ĝin per Esperanta tajpilo kaj li respondecis pri korektado kaj kompilado. Tiele li sukcese eldonis ĝin.

Jam en la 50-aj jaroj li komencis korespondi kun eksterlandaj esperantistoj kaj plurfoje partoprenis internaciajn Esperantajn kongresojn kaj konferencojn. Li gastigis esperantistojn el Britio, Nederlando, Francio kaj aliaj landoj, helpis al membroj de la loka aso-



S-ro Bao Shujun (la tria de dekstre) preleganta en la 4-a E-Kongreso de la Zhejiang-a E-Asocio

cio starigi korespondajn rilatojn kun eksterlandaj esperantistoj.

Ningbo kaj Aachen de Germanio estas ĝemelaj urboj kaj post 1987 ankaŭ ĝemeliĝis E-organizoj de la du urboj, dank' al s-ro Bao kaj s-ro Wolfgang Bienen, prezidanto de la Aachen-a Esperanto-Salono. S-ro Wolfgang Bienen estas gastama kaj 5-foje invitis s-ron Bao al

Aachen, bedaŭrinde, li ne povis realigi sian vojaĝon pro diversaj kaŭzoj. La 5-an de oktobro 1995 laŭ invito s-ro Wolfgang Bienen venis en Ningbon por partopreni en la folkloraj kaj ekonomia interŝanĝo '95. Tio ege ĝojigis ilin. La du malnovaj amikoj finfine havis ŝancon interparoli vid-al-vid. En la hejmo de s-ro Bao la gedzoj de Bienen babilis kun lokaj esperantistoj ĝis profunda nokto. S-ro Bienen diris al la loka respondeculo: "Sen esperantistoj mi povus fari nenion ĉi tie." ■



S-ro Bao Shujun, lia edzino kaj ilia filino kun gedzoj Wolfgang Bienen

Inter la du generacioj

Okcidentaj gejunuloj memstariĝas ekde la 18-a jaro, tial malsameco en vidpunktoj, kutimoj kaj sentoj ne kaŭzas tro da rektaj konfliktoj inter la gepatroj kaj gefiloj. En Ĉinio la gepatroj prizorgas kaj helpas siajn gefilojn dum sia tuta vivo, tial ofte okazas nekompreno inter la du generacioj kaj malakordo plej ofte inter bopatrino kaj bofilino. Nun multaj gejunuloj preferas vivi aparte de la gepatroj. Ekzemple mia kolego Wang Jianbing havas tian deziron. Eble, necesa distanco inter la hejmoj de la du generacioj reduktos tiun interiliaj koroj.

Yu Tao

de WANG JIANBING

ZORGO DE LA PATRINO

Patrino estas prikantata de mi dum mia tuta vivo. En elementa lernejo mi verkis artikolon pri mia patrino, kaj ĝi estis laŭdata kaj publikigita en loka ĵurnalo. Post kiam mi veturis al Pekino por lerni en universitato ege malproksima de mia hejmloko, iom post iom mildiĝis mia sopiro pri la gepatroj kun tempopaso, kaj mi memstariĝis, enradikiĝante en tiu urbego.

Mi revenis hejmen en mia unua universitata ferio kaj la patrino diris al mi, ke ŝi ofte murmuris al miaj gefratoj rigardante mian vakan liton: "Kiel statas mia Bingĉjo?" Ofte ĉe la murmurado ŝi larmis. Tial mia patro malmuntis mian liton, sekve la patrino larmis ne tiel ofte kiel antaŭe. Ĉe la komenco mi konsolis ŝin kaj diris al ŝi, ke mi bone fartas en Pekino. Sed mi ne komprenis, kial ŝi ploris pro mi, kiu bone vivas, ĉar en mia memoro ŝi estas tre firmvola kaj malcedema al malfaciloj. Tian senton mi komprenis nur plurajn jarojn post mia edziĝo.


En tia zorgo la gepatroj ĉiam senkaŭze maltrankviliĝas pro siaj gefiloj. Sed poste ili mem ridas je sia stultaĵo. Malgraŭ tio ilia maltrankviliĝo ripetadas pretervole.

LOĜADO ĈE LA BOGEPATROJ

Mia loĝejo ne estis radiatore hej-

tata, kaj karboforno ne estis sufiĉe varma, nek sekura. Do mi, mia edzino kaj la 5-monata filineto vintrumis ĉe miaj bogepatroj. Mi dolĉe vokis ilin "paĉjo" kaj "panjo", sed mi estis maltrankvila timante,

ke miaj vivkutimoj eventuale estos malagrablaj por ili. "Ne ĉiam tenu la bebon en la sino", mia tiu opinio fariĝis la unua konflikto inter mi kaj la bogepatroj. Ili tro dorlotis la bebon. Mi



La aŭtoro (dekstre) kun siaj patrino (maldekstre) kaj edzino

montris al ili libron pri infanvartado klarigante, ke foje plorado de bebo utilas al kresko de la pulmoj. Sed ili malkonsentis: "Kiu povus lasi sian infanon plori senĉese?" Mi ne konsentis kun ili, sed mi devis silenti.

Mi ne povis havi ŝatokupon loĝante ĉe la bogepatroj: Mi malofte televidis, ĉar ili rigardis televidadon temporaba; mi malofte aŭskultis muzikon, ĉar la bogepatroj, ambaŭ instruistoj, bezonis kvieton post taga laboro en la lernejo; mia horaro devis esti preskaŭ sama al tiu de la bogepatroj, ĉar ili dormas tiel facile, ke eta bruo vekas ilin el dormo.

Mi ofte helpis la bopatrino en kuirado, foje kaj foje eĉ kuiris sola. Ili rigardis min bona bofilo, kaj ankaŭ mi sentis ilian amon. Post unu jaro mia familio revenis al mia loĝejo. Forlasante la bogepatrojn, mi volis doni al ili sumon da mono kiel rekompenco, sed ili rifuzis. Mi scias, ke ili multe elspezis por mia familio.

MALAKORDO INTER LA BOPATRINO KAJ BOFILINO

Mia edzino kaj mi ambaŭ estas profesiuloj, do venis la demando: Kiu flegos la bebon? Post interkonsiliĝo kun la edzino mi venigis mian patrino de mia hejmloko, 4 000 kilometroj for de Pekino.

Mia patrino estas laborema, kaj infanvartado estis neniom malfacila por ŝi. Ŝi prenis sur sin la tutan dommastrumadon: flegi la bebon, lavi vestojn, prepari manĝaĵojn kaj purigi ĉambrojn. Sed nelonge poste ŝi eksentis, ke la hejmo de la filo ne estis tia kiel en ŝia imago.

Laborema, ŝi ne povas toleri alies pigrecon. En la unuaj tagoj, la domlaborojn neglektitajn de ni, ŝi ofte faris silente. Sed iom post iom ŝi ekplendis kontraŭ nia pigreco. Se mi senkulpigis min, ke mi laciĝis pro laboro en la oficejo, ŝi certe argumentis kun mi ripetadante siajn spertaĵojn, ke ŝi kreskigis sume 5 infanojn. En neĉesto de mia edzino ŝi ofte plendis kontraŭ ŝi, ke ŝi ne bone prizorgis min kaj ne bone faris dommastrumadon. Mi diris, ke ĉiu havas sian bonecon kaj nebonecon, ke mia edzino estas bonhumora kaj bonkora. Ne povante sin pravigi plu,

ŝi ĉiam finis la argumenton per la vorto: "Ne mi, sed vi vivos la tutan vivon kune kun ŝi!" Kaj krom tia argumento, ŝi ofte komparis sian "pigra" bofilino kun tiuj de aliaj. Ŝi timis, ke ŝia filo tro laboras.

Al mia edzino mankas sperto pri la aktuala vivo kaj ŝi estas mallerta en dommastrumado, dum la patrino estas mala. Por teni la familion en harmonio, mi ofte deadmonis mian patrino de grumbado. Tago post tago la patrino malsaniĝis pro malkontentiĝo kaj mi devis eskorti ŝin hejmen. Ĉe la foriro de la patrino la "pigra bofilino" donacis al sia bopatrino oran kolieron por montri sian dankon. Kiam ili vivis kune, ili malofte havis interparoladon, sed post disiĝo pli kaj pli oftigis inter ili telefona interparolo pri tio kaj alio, kaj rimarkblis nenia malakordo.

LA FILO KAJ PATRINO

Mi iam opiniis, ke mia patrino estas perfekta. Sed post la kunvivaĵo en Pekino mi konvinkiĝis, ke ankaŭ ŝi estas mankohava kiel aliaj patrinoj: ŝi estas egoisma por la intereso de la filo; ŝi ne volas, ke alia virino dividu kun ŝi la amon de la filo; ŝi foje estas naiva, postulante, ke mia donaco al ŝi nepre devas egala al tiu al miaj bogepatroj; kaj ŝi de tempo al tempo menciadis la dirojn de la bofilino, kiujn ŝi rigardis ne decaj.

Mi pensas, ke mi jam plenkreskas kaj povas klare vidi la ĉirkaŭaĵojn. La gepatroj vivtenis min ĝis mi povis memstariĝi en la socio, kaj eble de tiu momento miaj opinioj pri la realaĵoj fariĝis pli objektivaj. Ĉiaj okazintaĵoj fakte jam ekzistas antaŭ ol mi rimarkis ilin, sed ili estis kaŝitaj de la patrino-fila interrilato.

Mi pensas, ke en la okuloj de la patrino mi jam ne estas la antaŭa Bingĉjo. Mi jam havas miajn proprajn ideojn kaj ne estas absolute obeema al ŝi kiel antaŭe, mi estas pigra hejme, nek ŝparema kiel ŝi, kaj



La infano kun siaj avo (maldekstre) kaj avino (meze)

pli terure por ŝi estas tio, ke vorto de la alia virino ofte estas pli efika ol la ŝia.

APARTE LOĜU LA DU GENERACIOJ

El miaj propraj spertaĵoj mi opinias, ke por teni harmoniajn interrilatojn inter la du generacioj, estas pli bone, ke ili loĝu aparte. Maljunuloj timas ne nur solecon sed ankaŭ brudadon. Se la bopatrino kaj la bofilino ne povas vivi en akordo, tio ofte metas la filon en embarason. La du generacioj havas diferencajn vivkultimojn, vidpunktojn kaj spertaĵojn. Ofte du generacioj havas tute diferencajn opiniojn pri la sama afero. Maljunuloj emfazas sperton, dum la junuloj provon; maljunuloj akcentas praktikeblecon, dum la junuloj modon; maljunuloj inklinas al stabileco kaj rutinoj, dum la junuloj al noveco kaj ekscitiĝo. Pro la diferencaj opinioj la du generacioj ne povas sin akordigi unu al la alia. Ĉu surmeti aŭ demeti veston pro veterŝanĝiĝo? Ĉu aĉeti novan veston? Ĉu bebo devas kuŝi surdorse aŭ surventre? Ĉu preni aŭtobuson aŭ taksion?... Je ĉiaj tiaj bagatelaĵoj estiĝas malagrablaĵoj. Iuj maljunuloj silentas al tio kaj post certa tempo ili malsaniĝas pro nevola silentado; aliaj maljunuloj eldiris, sed tio malagrabligis la junulojn. Ĉu ne estos bone, se la du generacioj ne vivu kune, kaj la junuloj ofte vizitu la gepatrojn? ■

Ŝtonskulptisto kaj liaj asistantoj

En la lastaj jaroj oni iom post iom konis la nomon de ĉina skulptisto Zhang Baogui, kies originalaj ŝtonaj verkoj estas kolektitaj de ŝtataj galerioj, historiaj muzeoj, fakuloj kaj erudiciuloj. Mirinde, liaj asistantoj estas kamparaninoj, kiuj povas fari tiujn belajn artaĵojn.

S-ro Zhang diris: "Mi ne inklinas al racia verko, kaj miaj verkoj estas subkonsciaj. La kamparaninoj, mi opinias, bone helpas mian kreadon pli ol tiuj kleraj urbanoj... Ili estas honestaj, ankaŭ miaj verkoj estas senafektaj."

Zhang Baogui (en okulvitroj) kaj liaj asistantoj



Asistanto riparanta skulptaĵon

En la pasintaj pli ol dek jaroj s-ro Zhang kaj liaj asistantoj kunlaboris kaj kreis pli ol cent artaĵojn, inter kiuj "Ĉina laborulino" prezentas kamparaninon. Gvidate de li, la asistantoj fariĝis lertaj skulptistoj kaj sentis, ke ili mem ŝanĝiĝis.



Travido



Skulptaĵo en la Ĝardeno de Beichen-centro en la Vilaĝo por Azia Sportkunveno en Pekino



Ĉina laborulino



Serĉi lulilon de Dongba-kulturo

de CHENG WEIDONG

ANTAŬ mia ekiro al Shangri-la mia amiko proponis al mi, ke mi, atinginte Zhongdian, vizitu Sankan, kiu estas subgub-

bernio de naŝi-oj, fama pro Dongba-kulturo kaj Baishutai-pejzaĝo.

Estas strange, ke Dongba-kulturo naskiĝis en Sankan, tamen hodiaŭ ĝi kaj ĝia kreinto — naŝi-oj estas ĉefe en la regiono Lijiang

de Yunnan-provinco. Kial?

BAISHUTAI KAJ DONGBA-KULTURO

Sudoriente de Zhongdian, en la naturparko de Haba-neĝmonto, situas Sankan, la unika naŝi-a aŭtonoma subgubernio de la Diqing-a Tibet-nacia Subprovinco.

He Zhiben, pli-ol-70-jara Dongba-o, parolis la han-an lingvon kun naŝi-a akcento. Li diris al mi, ke tiu, kiu scipovas skribi Dongba-ajn ideogramojn kaj kapblas gvidi Dongba-religian kultan ceremonion, estas nomata Dongba-o. En historia materialo “Dongba” signifas eruditon, kiu estas ŝamano de kulta ceremonio. En la 7-a jc. Ben-religio prosperis inter tibet-nacianoj. Tiam la indiĝenoj kun familinomoj Mu kaj Ye en la regionoj Sankan kaj Baidi (nun Baishutai) kreis antikvan hieroglifon surbaze de ŝamanismo, sorbante Ben-religian kulturon, kaj la religio de la antikva tribo ŝanĝiĝis en la nacian religion de la regiono — Dongba-religio, ke Ben-religio naŝi-iĝis, kaj ĉirkaŭ Baidi kreskis la originala Dongba-kulturo.

Dongba Shiluo, la unua sanktulo de la naŝi-a Dongba-religio, estis preterpasanta Baishutai kaj altirita de la pejzaĝoj. Do li predikis tie. Kaj Aming Shiluo, la dua sanktulo de Dongba-religio, samloke studis sutrojn, kaj laŭdire li kreis la Dongba-an hieroglifon tie. De tiam Baishutai fariĝis sanktejo de Dongba-religio. La Dongba-a hieroglifo estas nomata “viva fosilio de ideogramo”, kaj hodiaŭ ĝi ankorau estas uzata. Ĝi havas pli ol 1 700 ideogramojn, kaj en Baidi 1 500 el ili estas uzataj. En kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj oni vidas tiajn ideo-



Maljuna Dongba-o skribanta naŝi-ajn ideogramojn

gramojn kun brilaj koloroj kaj flujaj kaj simplaj strekoj. Estas multaj fabloj kaj legendoj en Dongba-lingvo.

TRANOKTADO EN BAISHUITAI

Hodiaŭ Baishuitai jam fariĝis

vidindejo: en Dongba-vilaĝo okazis Dongba-kultura ekspozicio, en kiu estas loĝdomo de naŝi-oj. Kelkaj maljunaj Dongba-oj kaj naŝi-aj knabinoj en la naŝi-aj vestoj klarigis al vizitantoj. Kaj en la ekspoziciejo prezentiĝas Dongba-aj sutroj, freskoj, fotoj kaj lignaj tabuloj por kultado. La direktoro de la ekspozicio diris, ke tiuj materialoj venis de lokanoj.

En la vilaĝo estas ligna domo kun naŝi-a trajto de Baidi-regiono. Ĝi havas lignan strukturon de naŝi-a arkitekturo. Ĝi estas fortika kaj simpla, kaj en la centro de la salono estas fajrejo kaj ambaŭflanke de la salono estas dormoĉambroj kaj grentenejoj. En tia domo estas varme en vintro kaj malvarmete en somero. La direktoro diris, ke ĝi estas translokita el naŝi-a vilaĝo.

Antaŭ la domo estis du Dongba-oj en Dongba-aj vestoj, kun kulta ĉapo sur la kapo kaj sving-tambureto en la mano. Svingante la brakojn, ili jen saltis jen kaŭris murmurante, tamen neniu el ni komprenis tion.

Vespere ni ripozis en la ligna domo. La luno alte pendis sur la ĉielo. Promenante laŭ ŝtona vojeto mi atingis la domon de la maljunaj Dongba-oj. En la ĉambro aŭdiĝis rido. Mi eniris la ĉambron, fajro brilis, kaj fumo de brulligno lev-



Ili dancas malnovan Dongba-an dancon.

iĝis. Unu el la maljunuloj skribis kaj la alia instruis Dongba-ideogramojn al naŝi-aj knabinoj. Tio rememorigis legendon pri Shangri-la.

BELA PEJZAĜO DE BAISHUITAI

La sekvan matenon, tuj post



Naŝi-aj knabinoj farantaj Dongba-ajn desegnaĵojn sur ŝtofo teksita de ili mem

kiam tagiĝis, ni rapidis al Baishuitai. La estro de Sankan-subgubernio diris al ni, ke naŝi-oj nomas Baishuitai "Shibuzhi" signifanta kreskantajn florojn. Legendo diras, ke Baishuitai estas kreita de feoj Meilidong kaj Meilise, do ĝi estas nomata ankaŭ "kampo donacita de feoj". Baishuitai, je 2 380 metroj super la marnivelo kun areo de 3 kvadrataj kilometroj, estas lafa tersurfaco, kiu formiĝis el blanka precipitaĵo de kalcia dikarbonato.

Antaŭ ni Baishuitai prezentiĝis kiel kristalaj florpetaĵoj. Tie lirlis klara fonto sub la brilanta suno.

Starante tie, mi enspiris freŝan aeron kaj rigardis la fumon levigantan el kamentubo de malproksima kamparana domo. Mi ne atendis, ke fore de brua urbo mi povis trovi tiel riĉan kulturon kaj tiel intere-

san moron.

VIZITI MALJUNAN DONGBA-ON

Forlasinte Baishuitai, ni eniris vilaĝon Wushuan. La antikvaj domoj kaŝis sin en verdaj juglandarboj kaj pomarboj fruktoportantaj. Virinoj laboris en kampoj kaj maljunuloj ripozis kun pipo en la buŝo. Ĉio ĉi prezentis al ni idilian vivbildon.


En la vilaĝo, mi vizitis maljunan Dongba-on He Zhanyuan. Li estis ordiganta manuskriptojn en Dongba-lingvo. Li diris al mi, ke iuj el liaj antaŭuloj estis Dongba-oj, sed hodiaŭ malmultiĝis veraj Dongba-oj. Li prezentis al mi siajn verkaĵojn — Dongba-sutrojn kaj rakontojn, kaj diris, ke nun en vendejo Dongba-sutroj kaj Dongba-kaligrafiaĵoj diferencas de la tradiciaj. Ekzemple, laŭ la tradicio oni uzas specialajn paperojn faritajn el ŝelo de arbedoj kaj tuĉon el pina fulgo kaj juglanda oleo. Tiaj paperoj estas dikaj kaj imunaj kontraŭ insekta mordo kaj tia tuĉo estas hele nigra kaj nedekoloriĝema. "Ĉu Dongba-kulturo povos konservi sian karakteron, se oni ŝanĝos la tradician teknologion?" La maljunulo timis. Ankaŭ fakuloj de la Kunming-a Instituto de Dongba-kulturo rimarkis tion. Ili klopodas por solvi la problemon. ■



Geknaboj ludantaj en akvo en Baishuitai



Naŝi-a pilgrimanto





Bela pejzaço de Baishuitai



Baishuitai

Konstrui domon por si mem

de CHAO YANG

MALJUNA ĉarpentisto estis baldaŭ emeritiĝonta kaj diris al sia mastro, ke li volas forlasi konstruadon kaj ĝui kvietan vivon.

La mastro persvadis la bonan ĉarpentiston resti kaj demandis lin,

ĉu li volonte helpos konstrui plian domon. La ĉarpentisto konsentis. Tamen la kolegoj vidis lian distriĝemon. Li faris fuŝan domon el malbonaj materialoj. La mastro donis al li la ŝlosilon de la domo.

“La domo estas sub via dispono,” la mastro aldonis. “Jen mia donaco por vi.”

La ĉarpentisto surpriziĝis. Li ne

atendis, ke la domo estas konstruita por li mem. Nun li devas loĝi en la malbona domo.

En la vivo ofte troveblas tiaj homoj kiel tiu ĉarpentisto. Ili malserioze traktas sian vivon. Kiam ili falas en dilemon, ili ne povas liberigi sin de la “domo” konstruita de ili mem.

Se oni estus tia ĉarpentisto, li devus prizorgi la domon kiel la sian kaj konstrui ĝin kun saĝo. Fakte via vivo estas via ununura kreaĵo, pento estas senutila. Ni devas serioze trakti ĉiun tagon por konstrui noblan kaj elegantan vivon. ■

La naŭa konkurso de EPĈ-legado finita

de WANG HANPING

Post kiam ni publikigis demandojn por la Naŭa Konkurso de EPĈ-legado en la 11-a n-ro 1998, ni ricevis 62 respondojn el 23 landoj. La konkursantoj plejparte estas niaj malnovaj legantoj, inter kiuj estas samfamilianoj, kiel gesinjoroj Rontynen el Finnlando, Nagi el Rumanio kaj Mattos el Brazilo, kaj ankaŭ komencanto, kiel Tjapkina Oksana el Rusio.

Kun maltrankvilo ni faris resumon pri la konkurso, ĉar falis en militon Jugoslavio, kie estas multaj niaj legantoj. Ĉi-foje 8 legantoj el tiu lando respondis al ni. Ni neniam vidis ilin, tamen iliaj bone konataj nomoj maltrankviligis nin. La milito detruis ilian pacan vivon. Ĉu ili bone fartas? Ni deziras, ke paco frue revenu en Jugoslavion!

Inter la konkursantoj troviĝas sinjoro Jovan Nešić el Jugoslavio. En la pasintaj jaroj li kontribuis al nia revuo kaj prezentis al ni proponojn. Sed bedaŭrinde, ne sciinte la rezulton de la konkurso, li forpasis antaŭ nelonge pro malsano.

Ni sentas grandan doloron pro lia forpaso.

Post lotado ni anoncas la rezulton de la konkurso kiel jene.

Gajnintoj de la unua premio: Genevieve Maillart el Francio kaj Irina Nagi el Rumanio; gajnintoj de la dua premio: Vladimir Hodin, Erkki kaj Aira Rontynen, Farkas Antal, Vaske G. O., Tjapkina Oksana, N. Konchenko, Szentgyorgyi Zoltan, Oleg Vasiljev, Vladimir Miĥejev, Irene Szucs; kaj gajnintoj de la tria premio: Jozef Kristian, B. Najbaro, C. Mattos, Vladimir Vyĉegjanin, Hans-Burkhard Dietterle, Victor Sluczewski, Juhasz Violo, Victoria Mihok-Geczi, Eugenia Ekaterina P., Rudi Izlakar, Francisco Jurandi de Melo, Rosa Mattos, Felicindo Abbruzzese, Zolravko Jakovljevic, Shen Guangmeng.

Solvoj de iuj demandoj:

1. 2.04 milionojn da jaroj (p. 11, n-ro 4);

2. Guangdong-a dialekto (p. 14, n-ro 4); la 20-a dec. 1999 (p. 9, n-ro 9);

3. Ĉinaj tradiciaj teatroj estas prezentataj kantante, dum dramo parolante (p. 20, n-ro 7);

4. Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono (p. 36, n-ro 6; p. 4, n-ro 9);

5. fine de la 22-a jc. a.K. (p. 46, n-ro 9); aŭ antaŭ 4 000 jaroj (p. 48, n-ro 6);

6. Zhang, Wang, Li (p. 42, n-ro 9);

7. la 10-a de septembro (p. 4, n-ro 8);

9. granda pando kaj aliaj (p. 39, n-ro 1); nordorienta tigro (p. 25, n-ro 6).

Al la 5-a demando multaj donis malĝustan respondon, ke la Okcidenta Xia fondiĝis en la jaro 1038. Sed la demando tuŝis la jaron, en kiu fondiĝis Xia-dinastio, kiu diferencas de la Okcidenta Xia. Ankaŭ la dua demando konfuzis iujn legantojn. Aomen (Makao) najbaras kun Guangdong, kaj la loĝantoj plejparte estas ĉinoj, kiuj parolas la Guangdong-an dialekton, unu el la ĉefaj dialektoj de Ĉinio.

En la 11-a n-ro 1999 ni aperigos demandojn por la 10-a konkurso, kiu estos iomete malsama ol la antaŭaj. Ni esperas, ke pli da legantoj partoprenos ĝin.



Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

La historio de evoluo de la homaro estas tiu por strebo al eleganta kaj harmonia vivmedio kaj vivkvalito.

Malfeliĉe, la homaro altigas la vivnivelon kaj samtempe detruas la medion kaj suferas punon de la naturo. Konflikto inter la

Nederlandaj florplantoj kulturataj en la foirejo



homaro kaj naturo, inter la homaro kaj medio, estas fenomeno konstanta en la homa evoluo kaj solvo serĉata ĉe la sojlo de la nova jarcento. La Monda Hortikultura Foiro inaŭgurita en la 1-a de majo 1999 en Kunming havas temon "Homaro kaj naturo". La dispozicio de la foiro emfazas pejzaĝojn naturajn kaj nenaturajn kaj konstruajn stilojn ĉinajn kaj alilandajn.

La franca ĝardeno en la internacia ekspoziciejo konsistas el florbedoj, rivereto kaj lageto. La francaj projektintoj per sciencameto prezentas

projekcion de Princino Musset sur la akvo, aŭskultigante rakonton kaj kanton por konigi la francan kulturan historion. En la nederlanda ĝardeno okulfrapas 15-metre alta ventmuelilo kaj pompaj tulipoj, kiuj konigas disvolviĝintan nederlandan hortikulturon kaj aplikon de ventpovo.

En la ĉina ekspoziciejo troviĝas Ĝardeno de Monto kaj Rivero de Guangxi, Karsta Ĝardeno de Guizhou, Ĝardeno de Tibeto kun tibet-stilaj domoj, pentraĵoj kaj gravuraĵoj, Porcelana Ĝardeno de Jiangxi kun porcelana metiejo, bambuaro, fruktokulturejo kaj plantejo de tradiciaj ĉinaj drogherboj, kaj Ekologia Ĝardeno de Fujian kun ornamaj plantoj en bela vivmedio. La foiro ne nur montras hortikulturan teknikon, sed ankaŭ serĉas vojon de harmonio inter la homaro kaj naturo.


La foiro altiris tre multajn vizitantojn.



En Ĝardeno de Tropikaj Vegetaĵoj



Norio



Kuriozaj tropikaj vegetaĵoj



La Monda Hortikultura Foirejo



Ĝardeno de Miniaturaj Pejzaĝoj



Loĝdomoj sur stepo



Puran medion al turistoj

de PING HUA

EN la 80-aj jaroj, la ĉina turisma servo prenis loĝadon, trafikon, manĝadon, amuzojn kaj aĉetadon kiel gravajn kondiĉojn por disvolvi turismon en Ĉinio. Kun la turisma disvolviĝo, oni trovis ke malbona stato de necesejoj kaj media higieno pli kaj pli malhelpas ĉinan turismon. Malmulteco kaj malpureco de necesejoj en turismaj lokoj multe maloportunigis la turistojn, precipe la eksterlandajn. Post kiam la Ĉina Turisma Administracio deklaris, ke 1999 estu turisma jaro de media higieno, pliboniĝo de necesejo kaj media higieno fariĝis multe atentata de la ĉina turismo.

Ja estas tre malfrue meti "necesejan problemon" en la tagordon je la fino de la 20-a jarcento. Tion kaŭzis ne nur la ekonomia stato kaj postiĝinteco de ĉina turismo, sed ankaŭ la malnova koncepto. De miloj da jaroj ĉinoj rigardas necesejon malpura loko kaj evitas mencii ĝin en la publiko. En la antikva

Ĉinio la ideogramo kun la signifo de necesejo havas signifon: loko proksima al porka stalo. Antikvuoj eĉ ne volis rekte diri "iri al necesejo", sed anstataŭe diris "iri tualeti", kaj la modernaj ĉinoj havas novan dirmanieron "iri por oportuno".

Nun ĉiujare preskaŭ 100 milionoj da eksterlandanoj vizitas Ĉinion. Kompreneble ne ĉie, kie ili vizitas, estas malpure, sed multaj el ili plendis kontraŭ la malpureco de necesejoj. Iu fremda turista ŝerce diris, ke por iri al necesejo en Ĉinio ili devas porti kvar objektojn: ombrelo kontraŭ pluvo, poŝlampo kontraŭ mallumo, buŝŝirmilo kontraŭ malbonodoro kaj galoŝoj kontraŭ koto. La ŝerco ja estas troiga. Sed la problemo estas atentinda.

Ĉio ĉi konsciigis al la ĉina turisma servo, ke oni nepre devas ŝanĝi la staton de la necesejoj. En la lasta duonjaro de 1992, ĉe turismaj lokoj en Ĉinio aperis pagigaj klozetoj. Post septembro 1994 aperis 100 novstilaj kloze-

toj en ĉefaj vidindejoj de Pekino. La Ŝtata Turisma Administracio asignis grandan monsumon por konstrui novajn klozetojn en ĉefaj turismaj lokoj en Ĉinio. Sur Taishan-monto rub-telfero estis konstruita en majo ĉi-jare kaj oni ne plu enterigos rubon ĉeloke. Kaj krome tie fininstaliĝos post nelonge subteraj tuboj por trakti malpuran akvon.

Nun ĉinoj multe zorgas pri tio, kiam publikiĝos la Leĝo de Media Higieno, Leĝo por Trakti Rubon kaj Leĝo de Necesejo. Kiam la ĉinoj bone observos tiujn leĝojn, certe pli multaj turistoj vizitos Ĉinion. ■

Nova necesejo



Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj (m)	kHz
11:00-11:30	Japanio, Koreio	41,84	7170
		31,46	9535
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25,86	11600
		25,34	11840
20:00-20:30	Eŭropo	40,51	7405
		30,11	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30,43	6860
		43,17	6950

Hejmo de sovaĝaj elefantoj



Sovaĝaj elefantoj

Teksto kaj fotoj de QIU KAIPEI

La tropika pluvarbaro de Xishuangbanna de Yunan-provinco, Ĉinio, estas mallarĝa kaj longa, nomata valo de sovaĝaj elefantoj, kiu kovras areon de 112 000 hektaroj. Tio estas sola loko de Ĉinio, kie vivas aziaj elefantoj. La valo apartenas al Mengyang-naturparko, kie vivas multe da sovaĝaj bestoj, precipe sovaĝaj elefantoj. Dank' al penado de sciencistoj kaj esploristoj en proksimume 20 jaroj, la loko havas pli ol 300 sovaĝajn elefantojn.

Por plu protekti la rarajn bestojn kaj multigi enspezon por plibonigi la naturparkon, oni disvolvas turismon, ekspedicion, esploradon ktp.

La valo de sovaĝaj elefantoj estas limigite malfermita, tamen oni havas ŝancon kontakti la misteran tropikan pluvarbaron de Xishuangbanna kaj ĝui la naturon.





1	2	5
	3	
	4	

- 1 Nutrado de sovaĝaj elefantoj per salo
- 2 "Familio"
- 3 Elefantrigardejo sur arbo
- 4 Harmonio inter turistoj kaj sovaĝaj elefantoj
- 5 Ĝuado de pejzaĝo en pendvagono

Ok jaroj da nomadismo ĉirkaŭ la mondo

Franca paro Bruno kaj Maryvonne ROBINEAU vojaĝis tra la mondo dum ok jaroj kaj duono. Antaŭ ol forlasi Francion, Bruno estis terkulturisto kaj Maryvonne sekretariino. Dum sia migrado ili interesigis precipe pri la kamparana vivo, laborante kaj loĝante kun kamparanoj en plej diversaj landoj. Sed ili estis ankaŭ en multaj aliaj socitavoloj. Tiel ili ekkonis 15 landojn tra la intimeco de familioj, tra la ĉiutagaĵoj de vilaĝoj. Ili lernis Esperanton survoje en Bulgario kaj poste multe uzis la lingvon kaj ankaŭ instruis ĝin. Post sia reveno en Francion ili fariĝis prelegistoj pri tiu sperto pere de lumbildoj, kiujn ili prezentis por ĝenerala publiko, en lernejoj, malsanulejoj... Ili ankaŭ verkis libron en la franca, kaj la Esperanta traduko estis pretigita por la UK en Montpeliero. Ilia prelego en la Montpeliera UK estis admirata de la aŭskultantoj. Iliaj aliaj artikoloj pri tiu ekskterordinara aventuro sekvos poste kaj kredeble ankaŭ interesos niajn legantojn.

La Red.

de MARYVONNE ROBINEAU
(Francio)

AGRIKULTURISTO enradikiĝinta en sia hejmgrundo, Bruno iam forlasis siajn kampojn por vojaĝi kun mi tra la mondo. En li ardas la flamo iri ĝis la limoj de la tero por partopreni en la ĉiutagaĵoj de la homoj, plekti ligilojn, percepti la aliulon en la aŭtenteco, en la vero.

Animataj de la nesatigebla sciivolo travivi la kondiĉon de fremdulo, ni estas forirontaj por kvar jaroj. Ni ja bezonos ok jarojn por renkonti la homojn tra iliaj kulturoj kaj agrikulturoj, ok jarojn por konatiĝi kun kelkdek landoj. Vojaĝo postulas tempon, se oni volas sorbiĝi je la sento de la vizititaj popoloj.

Vojaĝi ne signifas esti spektanto: por pli bone koni la homojn, ni partoprenos en ilia laboro, interŝanĝante la laciĝon de niaj muskoloj kontraŭ gastigo kaj nutrado, ni vivos kun iliaj familioj, dividos kun ili la manĝojn, travivos iliajn festojn, ĝojojn kaj mal-

feliĉojn.

La kamparana mondo estos la privilegia medio de niaj renkontoj (sed ni ankaŭ spertos familian vivon en tre diversaj medioj, ĉe bulgara oficiro, japana kadro aŭ aŭstralia instruisto...) Post volontula laboro en la izraelaj kibucoj, ni rikoltas la lentojn kun Ram Prasad, modesta hinda kamparano, kiu akceptas nin per la jenaj vortoj: "Mi estas feliĉa, ke Dio elektis min por vin akcepti." Elstara kulturo de tiuj, kiuj scias nek legi nek skribi, sed posedas kornoblecon. Ĉiumatene, ni estas sur la kampoj ekde la kvina, por profiti de la relativa malvarmeto. La najbaroj miras kaj venas palpesplori la manojn de tiu stranga fremdulo kiu kaŭras kun ili sur ties tero. La komuna tasko, nepre universala lingvo, havas la mirindan povon plekti ligilojn.

Travivi la ĉiutagecon de la familioj ne ĉiufoje estas facile. Sed monatoj da simpla dieto konsistanta senŝanĝe el rizo, tritikaj platkukoj kaj lentoj, perdigas al Bruno pli ol 15 kilogramojn. Vidante lin elĉerpita, senenergia, mi mal-

trankviliĝas: ni havas nek medikamentujon, nek asekuron, krom tiu de Providenco! Saman misnutrado-problemon li spertos en Bolivio, kiam la familio Cruz dividos kun ni siajn ĉiutagajn terpomojn kaj cerealojn.

Enkarcerigita en la betono de la centbraka tokia urbego, ni sufokiĝas kaj indignas pro la konsumadego, la fuŝperdado...: ĉu estas ni sur la sama planedo? Feliĉe, la gastigado en familioj kompensas la malfacilaĵojn: Kenzi Muraoka invitas nin en sian vilaĝon; Umiko partoprenigas nin en siajn kursojn pri teceremonio, florarangĝo; en Oomoto ni travivas serenajn novjarajn nokton... Kaj malavarulo donacas al ni biletojn por Kabuki-teatraĵo. Ne malpli ol 22 familioj akceptas nin hejme dum la naŭ monatoj de nia restado. Tamen nia gvidlibro informis: "La eksterlandaj turistoj havos tre malmulte da ŝanco ekkoni japanan hejmon, ankoraŭ malpli da ŝanco tie tranokti." Ankoraŭfoje ni povas danki al Esperanto.

La lingvo, kiun ni lernis sur-



S-ro Bruno laboranta en rizkampo en Koreio

voje en la bulgara lernejo de Pisanica, fariĝis la vera ŝlosilo de niaj renkontoj kaj, dank' al ĝi, ni povis eniri la intimecon de multaj familioj. Ĉiuj restas karaj en nia memoro: en Bulgario, niaj unuaj esperantistaj gastigantoj, Cvetan, Stveka kaj aliaj akceptis nin, malgraŭ la tiama registara malpermeso gastigi eksterlandanojn; hungara altranĝulo aranĝis por ni oficialan vojaĝon kun interpretisto, luksaj restoracioj kaj hoteloj, por ke ni malkovru la tiean agrikulturon: Tibor Sekelj, kiu dormigis nin en ĉambro kie maskoj el la kvaranguloj de la mondo strange rigardis nin, forte kuraĝigis nin por nia entrepreno.

Alia kontinento, sama utileco de Esperanto. Jam fervoraj pri la lingvo, ni ĝin instruis al ĝainaj monaĥinoj, en Hindio. Taman unu lecionon ni ne sukcesis enkapigi al niaj bonegaj lernantinoj: temas pri la sufikso AJ. Kiam ni klarigas ke ĝi utilas por esprimi la nocion pri viando, niaj lernantinoj tuj forpuŝas ĝin. "Ne, nepre ne, ni ne bezonas lerni tiun vorton!" ili naŭze ekkrias. Por tiuj striktaj vegetaranoj ne eblas eĉ elparoli la malpiegan vorton!

Esperanto kondukas al ĉio, eĉ al luksaj hoteloj! En longdistanca rondvojaĝo, ĉio povas okazi, la plej malbono kaj la plejbono. Kun la sama sereneco oni devas akcepti tion, kion proponas la Destino: tranoktadon sur publika benko aŭ unu semajnon ĉe la hotelo Merlin, en Kuala-Lumpur, Malajzio, senpage proponitan de la direktoro... Esperanto-parolanta!

Ne tiel luksa, sed tiom agrabla estis la restado ĉe Wei Chi, juna ĉina kamparano kiu gastigas nin en sia izolita vilaĝo en provinco Shanxi. Ni ne povas menciigi ĉiujn, kiuj tiom kore akceptis nin en Aŭstralio, Nov-Zelando, Usono, Bolivio... Aparte karmemora restos por ni tiu lando, ne nur ĉar de tie devenas Vincent, nia filo adoptita kiam kvarmonata bebo, sed ankaŭ ĉar tie naskiĝis vera amikeco kun Freddy kaj Tomoko, membroj de Pasporta Servo: ni alvenis ĉe ili por tri tagoj kaj... kvin monatojn poste, ni plu gastis ĉe ili!

Sed... Esperanto perdigis al mi la fadenon de mia rakonto! Mi devus ankaŭ paroli al vi pri nia laboro en aŭstralia aborigena komunumo, kiu konsciigis nin pri la respondeco de la blankuloj en la detruo de in-

diĝenaj popoloj. Aŭstralio, tiu vastega kontinent-lando, ankaŭ donis al Bruno la okazon fariĝi vakero en 600 000-hektara bieno. Kia kontrasto kun Japo K'asa, indiana vilaĝeto en la bolivia altebenaĵo, kie Luis Cruz kultivas 1,15 hektarojn dividitajn en 34 etetajn parcelojn. Tamen, en tiuj glaciaj solejoj, en 4 300-metra altitudo, la kamparanoj daŭre dankesprimas al "Paĉamama", la tero-patrino, kiu estas sufiĉe bonkora por donaci al ili la ĉiutagajn terpomojn.

Ĉu mi povas forgesi en mia rakonto la inviton al geedziĝfestoj en kanaka tribo el Nov-Kaledonio: unu semajnon da festoj, bankedoj, ceremonioj laŭ la tradicio? Aŭ memori — kun malpli da sereneco — pri la tago kiam, en Gvatemalio, ni ricevis mortminacon subskribitan de la gerilo: "Vi disponas tri tagojn por forlasi la landon. Aŭ trafos vin morto!"

Ne eblas ĉion diri pri tiuj okaroj. Ok jaroj por trakuri la planedon, renkonte al viroj kaj virinoj en ĉiu tago. Tiujn homojn ni trovis kiaj ili estas, kiaj estas vi kaj mi, teneraj kaj kruelaj, blankaj kaj nigraj kun iliaj angoroj kaj revoj. Tial, kiel strange estas nomi la alian Fremdulo! ■


Por scii pli pri tiu eksterordinara aventuro, unu libro:

"Ili vivis sur la tero - Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo" 240 paĝoj - 8 paĝoj kun koloraj bildoj

Havebla ĉe UEA aŭ Bruno Robineau - 49270 Landemont - Francio - Tel-Fax 02 40 98 78 76 -E-poŝto: Bruno.Robineau@wanadoo.fr

120 FF + Sendokosto: 20 FF por Francio - 30 FF por aliaj landoj

LIGNOSKULPTURO DE QUANZHOU



Sovaĝaj anasoj


Fotoj de LI QIANG

La lignoskulpturo de Quanzhou prenas lignojn de longano, bukso kaj kamforarbo de suda Ĉinio kiel sian materialon.

La lignoskulpturo havas multajn specojn: reliefoj malprofunda, profunda, aĵura kaj aliaj, kaj la skulptaĵoj prezentas homojn, pejzaĝojn, birdojn, bestojn kaj florojn.



Majstro Darmo



Tropikaj fiŝoj

Alilandaj studentoj en Ĉinio

de PANG NAIYING

NUN pli ol 210 000 alilandaj studentoj lernas en Ĉinio, kaj plejparto el ili venis pro la riĉa ĉina kulturo.

ANDREO AMAS MONTON

Andreo nun studas en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato. Mi vidis lin en sporta kunveno de la universitato, kiam li fiksis sian rigardon sur la gimnastiko de ĉinaj infanoj, maskovestitaj en leporojn. Mi diris al li, ke tiu ĉi jaro estas lepora jaro. Kaj li tuj respondis: "Jes, tio estas simbolo de aĝo. Mi naskiĝis en serpenta jaro, en 1977." Tiel ni interkonatiĝis.

Li portis sur si bluan katanan ĉinstilan jakon kun stara kolumo kaj ŝtofaj butonoj. Li diris, ke la jako estas tre komforta kaj ke li aĉetis ĝin en antikva strateto de Pekino. Kiam li provis la jakon, la juna vendistino diris kun ridi: "Ha, vi aspektas kiel mia avo..."

En interparolado mi sciis, ke li venis el Italio. Li estis studento de la dua klaso de la Roma Universitato, studanta la historion kaj kulturon de Ĉinio. Li mepage studos la ĉinan lingvon por unu jaro en Ĉinio por povi pli facile legi librojn en la ĉina lingvo. Pri la ĉinaj ideogramoj, li havas malsaman opinion kiel tiuj de afrikaj kunlernantoj. Li opiniis, ke kun intereso oni lernas ne malfacile. La ĉinaj ideogramoj estas tre interesaj, ke preskaŭ ĉiuj ideogramoj rilate akvon prezentas duonon de sia figuro kiel akvon, dum ideogramoj rilate monton prezentas duonon de sia figuro kiel monton. Li skribis sur mia kajero du ideogramojn "Qing" kaj "Shan" en la signifo de "verda monto". Li diris: "Tio estas mia ĉina

nomo, kiun donis al mi ĉina junulo nomata Quan (fonto). Li diris, ke mi, Monto, kaj li, Fonto, estas amikoj."

Qingshan (Andreo) amas monton ne pro tio, ke lia nomo entenas la signifon de monto. Li devenis de kristana familio, sed kredas je budaismo. Multaj el la ĉinaj budaismaj sanktejoj sin kaŝas en profundaj montoj. En la lastaj someraj ferioj li pilgrimis al Emei-monto alta je pli ol 3 000 metroj. "Ĉi tie estas la kultejo por la bodisatvo Samantabhadra. Lia nomo en la ĉina lingvo signifas savi la homojn el la suferoj. Tiutage mi kultis la bodisatvon..."



Andreo en ĉemizo kun la ĉina ideogramo "Budho"

Interparolante kun Andreo mi rimarkis, ke li estas grave kripla je la piedoj. Ĉiu paŝo por li estis malfacila, sed li piediris 65 kilometrojn por veni al la monto. Li ne estis ĉagrenita de sia kripleco, sed ĉiam tenis en sia memoro la memkulturantojn sur la monto. Li diris, ke foje, kiam li iris sur kruta kaj glitiga vojeto en pluvo, iu grandaĝulo donacis al li

bambuan stangon, monaĥoj regaligis lin per vegetara manĝo, kaj maljuna pordisto de la templo donacis al li jadan amuleton budha statueto: "Portu ĝin, ĝi gardos vin dum via vojaĝo."

KOMPRENANTO DE LA ĈINA MEDICINO

"Cerbera trombozo paralizis mian patrinon je 6 jaroj kaj fine forrabis ŝian vivon. Mi volas patologie esplori la malsanon por liberigi la sam-specajn malsanulojn el la sufero. Mi kredas, ke la antikva ĉina medicino solvos mian demandon." Tion diris s-ro Lee Myung Rai el Koreio. Diplomite el la Korea Politika kaj Jura Universitato, li laboris 7 jarojn. Lia edzino estis instruistino en konservatorio. Sed poste ili venis al Ĉinio kun la gefiloj por studi la ĉinan medicinon. Ili konfidis la infanojn al infanĝardeno kaj poste al elementa lernejo, kaj ili studis la ĉinan medicinon en la Ĉinmedicina Instituto de Tianjin. Post 5-jara studo Lee venis al la Ĉina Esplora Instituto de Ĉina Medicino kiel esplorstudento.

La ĉina medicino havas principon: "Kun bona funkciado de ĝinglŭo-oj oni ne sentas doloron, kaj doloro montras malbonan funkciadon de ĝinglŭo-oj. Por forigi malsanon oni devas normaligi la cirkuladon." Lee iluminigis de tio. Estinte laboranto de socia scienco, li opiniis, ke tiu principo taŭgas ne nur por kuraci korpan kaj spiritan doloron de malsanuloj, sed ankaŭ por analizi ĉiujn flankojn de la homaj interrilatoj kaj la socia vivo. "Huangdi Neijing", libro antaŭ pli ol 2 000 jaroj, estas la fonto de la teorio de la ĉina medicino, sed, ĉu oni povas opinii, ke ĝi estas libro sole pri medicino? Ĝi enhavas antikvajn filozofion, as-



Lee
Myung
Rai

tronomie, meteorologio, geografio, *ĉigong-on* k.a. La libro havas la titolon entenantan la nomon Huangdi, gvidanto de la antikva ĉina nacio. Kion aludis la antikvuloj? Krome, en receptado de tizano oni aplikis antikvan "Strategion de Sunzi". En la libro estas frazoj, "homa korpo estas mikromondo, kaj sola homa korpo povas reprezenti la fizionomion de la ŝtato", "supera kuracisto kuracas ŝtaton, ordinara kuracisto — malsanon". Tio signifas, ke eminenta kuracisto kuracas ne nur malsanulojn, sed ankaŭ la ŝtaton, ĉar la ĉina medicino trovis la interrilatojn inter la internaj malsanoj de la homoj kaj la ekstera medio — se paco mankos al la ŝtato, la popolo vivos en doloro, do certe estiĝos malsano. La principo de la ĉina medicino ja estas temo studata de psikologio, profilaktiko kaj medicina sociologio de la okcidenta medicino.

Lee, pasie ŝatanta la ĉinan medicinon, serĉis la kaŭzon de la ekonomia krizo de Sudorienta Azio, surbaze de la ĉinmedicina teorio de ekvilibro de *jin* kaj *jang*. Li opiniis, ke la orienta kulturo apartenas al *jin*, dum la okcidenta al *jang*. En la lastaj jaroj Sudorienta Azio tro multe enkondukis el Okcidento, kaj la ekonomio disvolviĝis tre rapide, sed tio kaŭzis senilan *jin* kaj orgasman *jang*, kvazaŭ granda arbo, kun prospera krono sed subnutrata radikaro, facile falas en tajfuno. Ĉinio povis senŝanceliĝe stari en la krizo ĝuste dank' al sia forta radikaro. Lee opiniis: "Oni ne mezuru potencon de iu lando nur per ekonomia liniilo; longhistoria kulturo ja estas forta ŝtata potenco."

Lee tion parolis ĝuste unu tagon antaŭ prezentado de sia diplomiĝa

disertacio kun la titolo "Kuraco de cerba trombozo kaŭzita de diabeto per ĉinmedicina medikamento kaj lasero". Certe ĝojiĝus lia patrino, se ŝi scius pri tio en la alia mondo. Por tio li jam studis 7 jarojn kaj elspezis la tutan ŝparkason. Pro ekonomia depresio enlande, lia edzino ne trovis laboron, sed li diris, ke estas ĉina proverbo, "por grimpi monton, oni certe trovos vojon". Mi esperas, ke ili baldaŭ elturniĝos.

Por ŝpari monon, li prenis malkaran manĝon en lunĉejo. Li diris, ke laŭ la ĉina medicino homoj en trankvilo kaj bona stato de cirkulado de la vitala energio kaj sango povas esti sanaj malgraŭ ke la manĝo ne estas sufiĉe bona.

Lee Myung Rai baldaŭ diplomiĝos. Li esperas trovi laboron en Ĉinio kaj daŭrigi sian studon ĝis doktoriĝo. Kaj li tre sopiras la edzinon kaj la gefilojn. Li montris al mi leteron de sia filino skribita en la ĉina lingvo: "Studu diligente en Pekino. En la korto disfloras konvolvulo grimpanta supren laŭ la ŝnuro, kiun vi fiksas por ĝi. Mi kvaŭzaŭ aŭdas ĝian kantadon..."

"EŬROPA SIMIO" GALA

Kiam mi telefonis al Gala, brita esplorstudento pri pekina opero en la Ĉina Teatra Instituto, lia unua vorto estis: "Multaj ĉinoj fieras pro pekina opero, ke ĝi tiom admirigas fremdlandanojn. Kaj mi demandis: 'Kial do vi ne lernas pekinan operon?'" Gala maltrankviliĝis pro la depresio de pekina opero, kaj en lia vorto mi sentis kritikon. Mi diris, ke pekina opero kadukiĝis pro malmultiĝo de spektantoj, ke la modernaj junuloj ne komprenas la tekstojn de la opero. "Jes, la enhavoriĉa pekina opero bezonas pacienca remaĉadon, sed ĉinoj estas tro hastemaj. Ili posedas la riĉan tradician kulturon, kaj pro abundeco ili jam ne domaĝas perdi ion." Li bedaŭris ankaŭ, ke multaj pekin-operaj aktoroj ŝanĝis sian profesion: "Ili volas lukri pli da mono, sed ne scias, ke ili posedas tiel bonan arton. Mi ekzemplu. Li tenas ovon en la mano, li nur scias, ke ĝi estas ovo, sed ne scias, ke la ovo entenas oron."

"Kial vi fremdlandano ŝatas

pekinan operon?" mi demandis. Gala respondis, ke li antaŭe studis tridimensian movbildon de komputero, kio bezonas belecon. La gestoj, muziko, vestoj kaj koloro de pekina opero estas tre belaj, kaj li tuj ekŝatis pekinan operon. Antaŭ 5 jaroj li venis al Ĉinio por lerni pekinan operon kaj trovis, ke ĝi estas multe pli bela ol li povis imagi. "Ĝi estas vera arto. Komputero estas scienco, imitado kaj falso, facile manipulebla. Mi disvastigos la veran arton per falsa, disvastigos la tradician ĉinan arton per la modernaj okcidenta scienco kaj tekniko, disvastigos pekinan operon al la tuta mondo." Kiam ĉinoj parolis kun li pri "nia" pekina opero, li tuj korektis: "Pekina opero ne estas sole via, sed apartenas al la tuta mondo!"

Por ke pli multe da homoj en la mondo ĝuu pekinan operon, Gala tradukis en la anglan lingvon la tekstojn de la dramo "Simio-reĝo Sun Wukong tumultas kontraŭ la palaco de la Ĉiela Imperiestro", mempage provludis, mem desegnis invitilojn kaj disdonis ilin al alilandaj ambasadorejoj. Li bone skulptis la artan figuron de simio-reĝo, kaj ĉe la rigardantoj de tempo al tempo eksplodis ridego kaj aplaŭdo.

De tiam Gala, kiu nomas sin "eŭropa simio", estis multe raportata en kaj ekster Ĉinio. En la Internacia Konkurso de Diletantoj de Pekina Opero "eŭropa simio" gajnis la plej altan premion. Antaŭ nelonge li iris al s-ro Wang Delin, kiu iam instruis al li la ludarton, kaj petis: "Mi volas ludi 'Restoracion Leono' (luktoplana dramo pri heroo Wu Song, kiu venĝis sian fraton murditan de la bofratino kaj ŝia adultanto) por gajni alian premion." La instruisto diris al li, ke li ne devas resti sur la nivelo de diletanto. La rigardantoj estas indulgemaj opiniante, ke li, eŭropano, kiel diletanto, jam sufiĉe bone prezentis pekinan operon. Sed lia nivelo bezonas plialtigon ĝis kiam la ĉinaj fakuloj kapjesos. Tial en la lastaj monatoj Gala pene sin ekzercadis en parko proksima al la instituto sub la direktado de sia instruisto. Ofte la ekzercado daŭris 4-5 horojn.

La tekstoj estis transskribitaj de

la instruisto, kaj legado de ĉinaj vortoj estis instruita de la instruisto. Kaj ankaŭ la vera pekina akĉento estis lernita ĉe la instruisto. Kiam mi refoje vidis Gala, li estis sin ekzercanta per sinsekvaj transkapiĝoj. Liaj movoj estis fortoplenaj, sed facilaj; kiam li falis sur la teron, nenia brueto aŭdiĝis. Ĉiu ekzercado ŝvitigis lin. La instruisto diris, ke li ekzercis sin per la movoj de rolo de batalanto. En Ĉinio oni lernis pekinan operon ekde la aĝo de 7-8 jaroj, sed Gala jam estis 37-jara, kaj cetere, post ekzercado li devis instrui en la internacia lernejo sporton, dancon, muzikon kaj komputeran manipula-

don, kio por li estis tre laciga. Pri la 5-jara lernado de pekina opero li diris: "Doloro."

Liaj gepatroj skribis al li ĉefe por du aferoj: "Ĉu vi edziĝis? Ĉu vi lukris monon? Se ne, tuj revenu." Fakte Gala ne havis tempon por enamiĝi kaj lukri monon. Sed li ne volis reiri hejmlanden, ĉar pekina opero estas lia vivo. La instruisto diris al li: "Gala, ne ĉagrenu vin mem. Iru hejmen kaj vi baldaŭ riĉiĝos per komputero. Sed vi nepre devas resti en Ĉinio, se vi ne volas forlasi pekinan operon." "Do mi edziĝos al pekinopera aktorino." Pririgardante lin, la instruisto diris ŝerce: "Vi ne estas bela nek riĉa, kiu do volas edziniĝi al vi?" Gala respondis

ĝojo: "Mi estas norma, via estetiko anormala."

"Gala" estas karesnomo donita de la instruisto. Oni pli kaj pli kutimiĝis al lia karesnomo kaj iom post iom preskaŭ forgesis lian veran nomon. Li estas azerbajĝandevena, naskiĝinta en Irano, kaj venis kune kun la gepatroj al Britio en sia aĝo de 12 jaroj. Li ege amas teatron de diversaj landoj. Li studis Ŝekspiron, lernis francan mimikon, italan komedion, kaj fine absorbiĝis en la ĉina pekina opero. Li diris, ke li estas tiuflanka "fakulo el eŭropanoj". Li intencis fondi lernejon aŭ teatran trupon por eksterlandanoj fascinitaj de la ĉina pekina opero, kaj poste turnei tra la tuta mondo por prezenti pekinan operon. ■



"Eŭropa simio" Gala

VIZITO AL MAKAO (I)

de ZHANG MEIZHI

MI eniris en aviadilon de la Makaa Aviada Kompanio en la Pekina Internacia Flughaveno por unu-semajna vizito al Makao.

FLUGI AL MAKAO

Kiam aŭdiĝis portugala elsendo en la kajuto, mi ekkonsciis la apartecon de Makao (Aomen) kaj mia penso flugis al la pasinta tempo antaŭ 400 jaroj.

En 1553 portugala komerca ŝipo proksimiĝis al Makao. Pretekstante, ke necesas sunumi la varojn malsekiĝintajn pro marakvo, la portugaloj komercistoj ekokupis

Makaon. Ĉe la bordo portugala komercisto demandis pri la nomo de la loko, sed lokano miskomprenis la demandon kaj respondis "Makao", kiu estis la nomo de iu templo, tiel Makao fariĝis nomo de la loko. La portugaloj regis Makaon jam 400 jarojn, tamen ne ŝanĝebla estas la fakto, ke Makao estas teritorio de Ĉinio, kaj makaanoj — ĉinoj.

El la mikrofono de la aviadilo aŭdiĝis alterne ĉina, portugala kaj angla elsendoj. Sed min plej profunde impresis la kanto:

Makao ne estas mia origina nomo.

Mi jam antaŭ longe forlasis vin, panjo!

*Oni forprenis mian karnon,
sed vi ankoraŭ karesas mian animon.*

Sopiras mi la panjon dum 400 jaroj!

*Voku min laŭ mia infana nomo Aomen,
Baldaŭ mi revenos hejmen, panjo!*

Baldaŭ realiĝos la deziro de la makaanoj. En la 20-a de decembro 1999, Makao revenos sian patrolandon. Tio estas granda ĝojiga afero por la ĉinoj!

Kvankam la portugaloj okupis Makaon 400 jarojn, tamen la okupado ne estis konfirmita per traktato. Post starigo de diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Portugalio en

1979, la du landoj komencis intertrakti por solvi la problemon de Makao. Portugalio agnoskis, ke Makao estas teritorio de Ĉinio, kaj promesis, ke en iu tago estonte, ĝi redonos Makaon al Ĉinio. En 1987, post plurfoja intertraktado, la du landoj subskribis la Komunan Deklaron de Ĉinio kaj Portugalio. La deklaro montras, ke Ĉinio repraktikos sian suverenecon super Makao ekde la 20-a de decembro 1999.

"Fraŭlino, kiun trinkaĵon vi volas?" milda

La Internacia Flughaveno de Makao




voĉo interrompis mian penson. Estis juna stevardo, bela kaj ĝentila. Mi estis tre kontenta pri la servo de la Makaa Aviada Kompanio.

Poste, intervjuante en la Makaa Aviada Kompanio Limigita, mi informiĝis, ke ĝi estas branĉo de la Ĉina Aviada Kompanio. Antaŭ la 9-a de novembro 1995, Makao ne havis sian aviadan kompanion. Nun la kompanio funkciigas 23 liniojn, per kiuj oni povas flugi al 32 landoj kaj regionoj. Deng Jun, vicĉefdirektoro de la Ĉina Aviada kompanio, diris, ke krom la Makaa branĉo, la Ĉina Aviada Kompanio investis ankaŭ kompaniojn de flughavena administrado, servo kaj trafiko en Makao. Videble, la progreson de la Makaa aviado multe akcelas la subteno de la Ĉina Aviada Kompanio.

Post 3 horoj nia aviadilo NX001 surteriĝis en la Makaa Internacia Flughaveno.

FLUGHAVENO SUR POLDERO

Tra mallonga trapasejo mi



Pasejo inter Makao kaj la ĉeŝfero de Ĉinio



Altaj domoj sur poldero

atingis la vestiblon de la flughaveno. Nur tiam mi rimarkis, ke nur 6-7 el la kunvojaĝantoj atingis la celokon, kaj la cetera granda parto bezonis ŝanĝi tie aviadilon por flugi al Taiwan aŭ Hongkong. En la bela vestiblo mi facile plenumis la formularon por forlasi la flughavenon. Laŭdire tie estis maro antaŭ kelkaj jaroj.

Fakte, ne nur la flughaveno sed

ankaŭ multaj ĉielskrapantoj, hipodromoj kaj stadionoj konstruiĝis sur poldero. En 1910 Makao havis areon nur de 11 kvadrataj km, sed nun 23.5. La poldero konsistigas duonon de la tero de Makao.

Makao konsistas el unu duoninsulo kaj du insuletoj. Polderigo komenciĝis antaŭ 100 jaroj kaj nun ankoraŭ daŭras. Dank' al la polderigo la areo de la duoninsulo kreskis de 2.23 kvadrataj km al 9 kvadrataj km. La polderigo

ne nur pligrandigas la loĝspacon de loĝantoj, sed ankaŭ pli multigas la enspezon de la registaro.

BELA PEJZAĜO DE MAKAO

La sekvantan matenon, mi frue ellitiĝis kaj eliris en krepuskon de Makao.

En tiu horo en Pekino jam bruis homoj kaj aŭtoj, sed sur la stratoj de Makao iris nur kelkaj homoj.

Oni diris, ke dense loĝas 430 000 popolanoj en Makao. Je la 9-a oni eklaboras kaj la butikoj funkcias de la 10-a.

Enspirante freŝan humidan aeron, mi sentis maron proksima. Kiel atendite, kiam mi iris iom antaŭen, mi vidis la maron. Laŭ la plaĝo etendiĝas ebena kaj pura pavimita vojo. Sur la vojo de tempo al tempo veturis aŭtoj. Rigardante la bluan ĉielon kaj la verdan herbotapiŝon mi dronis en plena kvieteco.

La Ponto Makao-Taipa kaj la Amikeca Ponto majestas super la maro. La Ponto Makao-Taipa kun longeco de 3 400 metroj finkonstruiĝis en oktobro de 1974. La Amikeca Ponto kun longeco de 4 414 metroj estis lanĉita en 1994. La du pontoj kiel ĉielarkoj interligas la Makaan Duoninsulon kun Taipa-insulo. Ili aldonas modernan koloron al Makao kaj prezentiĝas kiel bela pejzaĝo. ■



de SHAO MIN

ĈINIO estas lando multnacia. En ĝi vivas hanoj kaj 55 nacimalplimultoj, kiuj konsistigas 8% de la ĉina loĝantaro.

En la ĉina historio la diversaj nacioj ne estis egalrajtaj. Ĝenerale la ekonomio kaj socio de nacimalplimultoj estis subevoluintaj. En la komenco de la 50-aj jaroj en ilia vivo ankoraŭ estis restaĵoj de primitiva socio kaj la popoloj vivis tre malriĉe.

Por ŝanĝi la postiĝintecon de la popola vivo, realigi la komunan prosperon de ĉiuj nacioj kaj fondi grandan nacian familion egalrajtan, harmonian kaj reciproke helpantan, ĉe la naskiĝo de la nova Ĉinio, la registaro decidis praktiki nacian aŭtonomecon en diversaj nacimalplimultaj regionoj. La Komuna Programo, aprobita de la Unua Sesio de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, difinis, ke en la lokoj de nacimalplimultoj praktikiĝu aŭtonomeco kaj fondiĝu diversaj naciaj aŭtonomaj organoj. La nacia aŭtonomeco estis oficiale enskribita en la Konstitucion de la Ĉina Popola Respubliko kaj fariĝis baza politika principo por solvi la naciajn problemojn en Ĉinio kaj ankaŭ grava politika sistemo de Ĉinio. Faktio pruvis, ke tiu sistemo konforma al niaj ŝtataj kondiĉoj estas grava ga-

rantio por akceli disvolviĝon de ekonomio kaj aliaj aferoj kaj por realigi la nacian unuiĝon. Nun en Ĉinio estas entute 5 aŭtonomaj regionoj: la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono kaj Tibeta Aŭtonoma Regiono, kaj krome en Ĉinio estas ankaŭ 30 aŭtonomaj subprovincoj, 121 aŭtonomaj gubernioj. Tiuj kovras 64.3% de la totala areo de la ĉina teritorio.

La Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko kaj Leĝo pri la Naci-Regiona Aŭtonomeco de la Ĉina Popola Respubliko aprobita en 1984 difinis: "La prezidanto de la aŭtonoma regiono, estro de la aŭtonoma subprovinco kaj tiu de la aŭtonoma gubernio devas esti civitanoj de tiuj lokoj." Tiu difino detale montriĝas en la Leĝo pri la Naci-Regiona Aŭtonomeco. Ĝi estas la unua tia leĝo en la ĉina historio kaj grava leĝo pri la naciaj aferoj ekster la ĉina konstitucio.

La ŝlosilo de praktiko de la nacia regiona aŭtonomeco estas kulturaj nacimalplimultajn kadrojn. Interna Mongolio estas aŭtonoma regiono plej frue fondita en nia lando. La nombro de la tieaj nacimalplimultaj kadroj kreskis de 7 000 en la komenco de la fondiĝo de la regiono al 169 700 nuntempe. La prezidanto

de la regiono kaj estroj de subregionoj kaj gubernioj ĉiuj estas nacimalplimultaj civitanoj de tiuj lokoj. En la tuta Ĉinio la nacimalplimultaj kadroj nombras 2.5 milionojn, el kiuj estas kaj ŝtatoficistoj de diversnivelaĵ registaroj kaj diversfakaj laborantoj.

Por garantiĝi la uzadon kaj disvolvion de la nacimalplimultaj lingvoj la Leĝo pri la Naci-Regiona Aŭtonomeco difinis: "La aŭtonomaj aŭtoritatoj garantiu, ke la diversaj nacioj havu liberecon en uzado kaj disvolvo de sia propra lingvo kaj en konservado kaj reformado de siaj naciaj moroj kaj kutimoj." Sur la ŝildoj de la tieaj vendejoj kaj institucioj legiĝas lingvoj naciminoritata kaj hana, ankaŭ la registaraj dokumentoj estas presitaj en tiuj lingvoj. En la tieaj lernejoj oni lekcias samtempe en la du lingvoj. Nun Ĉinio eldonas pli ol 100 specojn de gazetoj kaj ĵurnaloj en nacimalplimultaj lingvoj. La radiostacioj elsendas ĉiutage en 21 nacimalplimultaj lingvoj.

Dum la pasintaj jardekoj la ĉina registaro faris grandan penadon por la komuna prosperiĝo de ĉiuj nacioj. Ĉar ekonomia kresko de diversaj nacimalplimultoj garantios la nacian egalecon en la vera senco de tiu ĉi vorto, la ĉina registaro faras ĉion eblan por disvolvi ekonomion en la nacimalplimultaj regionoj kaj rigardas tion grava afero por solvi la




Aŭtonomeco en Ĉinio

naciajn problemojn. En la pasintaj 20 jaroj multe disvolviĝis la tieaj fundamentaj konstruoj en akvoutiligo, elektro, komunikoj kaj trafiko. La ĉina registaro elspezis pli ol 1 000 miliardojn da juanoj por ekspluatado de riĉaĵoj kaj fundamenta konstruado en la meza kaj okcidenta regionoj de sia lando.

En Interna Mongolio estas pli ol 120 specoj da minaĵoj. La rezervokvanto de karbo okupas la duan lokon en Ĉinio kaj tiu de rara tero konsistigas 97% de la totala kvanto de la tuta lando. Tie fekundas la plej granda herbejo de Ĉinio. En la periodo de la Unua Kvinjara Plano (1953-1957) la ŝtato plenumis 16 gravajn konstruaĵojn en Interna Mongolio, inter kiuj estis la Aluminia Fabriko de Baotou kaj Ferŝtala Kompanio de Baotou. Antaŭ 1990 tie mankis elektro, kaj nun la problemo ne plu estas, kaj ĝi eĉ sendas superfluan elektron al Pekino.

En la Tibeta Aŭtonoma Regiono oni plenumis 43 projektojn en la 60-aj jaroj kaj nun Ĉinio levis alian novan tajdon por helpi Tibeton en la konstruado, kiu ampleksas 62 gravajn entreprenojn de terkulturo, bredado, energio, trafiko, poŝto kaj telekomunikoj. En la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono la Silka Vojo dorminta milojn da jaroj nun ne plu estas dezerta. Tie aperis la unua ferŝtala fabriko de Xinjiang, tekstilejo, kar-

bominejo... En la basenoj Junggar, Tarim kaj Turpan-Hami oni konstruis jam 38 oleo-gasajn kampojn, kies jara olea produktokvanto estas 16.25 milionoj da tunoj. Jam komencis funkcii la Nanning-Kunming-a Fervojo, Ertan-elektrejo, la Komunikita Optika Kablo de Pekino al Urumqi, Sud-Xinjiang-a Fervojo kaj Ningxia-a Irigacia Projekto, kiuj multe influas la ekonomian disvolviĝon de la nacimalplimultaj regionoj. Krome, la ŝtato ellaboris serion da privilegiaj politikoj rilate al nacimalplimultaj regionoj kaj establis fonduson por garantiigi bazajn vivrimedojn de la nacimalplimultanoj... Ĉio ĉi ludis aktivan rolon por akceli la ekonomian disvolviĝon de la nacimalplimultaj regionoj. En 1980-1998 la enlanda produktovaloro de Ĉinio kreskis meznombro je 9.8% ĉiujare, sed en la kvin nacimalplimultaj regionoj kaj la provincoj Yunnan, Guizhou kaj Qinghai, kie nacimalplimultanoj estas kompare multaj, la produktovaloro kreskis meznombro je 10.3% ĉiujare. En 1998 la urbanoj de nacimalplimultaj regionoj enspezis 4 800 juanojn, t.e. 12-oble kiom tiu en 1978, dum la kamparanoj enspezis meznombro 1 400 juanojn, t.e. 11-oble kiom tiu en 1978. Ekde la 90-aj jaroj la nacimalplimultaj regionoj akiris pli evidentan sukceson. Sole en 1998 la totala podetala komerca valoro en la landlimaj regionoj



Centro de komputero-manipulado por junuloj en Interna Mongolio

atingis 1.7 miliardojn da usonaj dolaroj. Aperis Erdos-Kompanio de Kaŝmiraj Vestoj en Interna Mongolio, Lan-tekstilejo Tianshan en Xinjiang kaj aliaj famaj entreprenoj investitaj de Ĉinio kaj aliaj landoj. La nacimalplimultaj regionoj aktive kunlaboras kun la ĉemaraj. Dank' al tio aperis nova situacio, ke la regionoj orienta kaj okcidenta samtempe praktikas pordmalfermon kaj reciproke helpas.

Kvankam rapide kreskas la ekonomio kaj socio en la nacimalplimultaj regionoj, tamen pro malalta nivelo en la historio, ili ankoraŭ iom postrestas kompare kun aliaj lokoj. Oni ja devas konfesi, ke nun la tiea ekonomio havas brilan perspektivon. Oni kredas, ke dank' al garantio de la Leĝo pri Naci-Regiona Aŭtonomeco la ekonomio kaj aliaj aferoj en la nacimalplimultaj regionoj estas promesplena. En nia granda harmonia familio la popola vivo de diversaj nacioj certe fariĝos pli kaj pli feliĉa. ■

La ĉina lingvo kaj la ĉina kulturo (I)

de ZHANG QICHENG

LA ĉina kulturo estas long-historia, ampleksa kaj riĉa, kaj la ĉina lingvo estas la ĉefa portilo de la ĉina kulturo. En la kelkmil-jara evoluado la ĉina kulturo pliriĉigis la ĉinan lingvon kaj siaflanke la lingvo plibriligis la kulturon. Sekve, “la ĉina lingvo kaj la ĉina kulturo” ja estas granda temo, kaj por pli bone pritrakti ĝin necesas skribi verkon ampleksan kun kelkcent paĝoj. Sendube, en tiu ĉi mallonga artikolo mi povas nur sensisteme prezenti kelkajn punktojn el tiu temo, kiuj laŭ mi estus eble interesaj por la legantoj.

LA ĈINA LINGVO KAJ KONFUCEANISMO

Parolante pri la ĉina kulturo, oni ofte mencias konfuceanisman, ĉar ĝi ludis ĉefan rolon en la kreskado kaj progresado de la ĉina kulturo kaj riĉigis la ĉinan lingvon.

Jam en pratempo la ĉinaj filozofoj konsciis, ke kiel ero de la naturo (ĉinoj nomas ĝin ĉielo), homo devas obei la naturajn leĝojn aŭ volojn. Kaj ili kreis la esprimon “unuiĝo de la ĉielo kaj homo”.

La homoj havas diversajn dezirojn. Konfuceanismo konsideras, ke tiuj deziroj estas naturaj instinktoj kaj oni ne povas nek devas ilin nei, tamen estas necese ilin limigi, por ke ili ne estu ekscesaj, alie ili endanĝerigus ne nur la individuan, sed eĉ la tutan homan socion. Sekve Konfuceo pledis, ke la homoj devas obei la decregulojn (reguloj por deca konduto) en ĉiuj siaj agadoj. La vortoj “humanismo”, “justeco”, “deco”, “saĝo” (racia

kono) kaj “sincereco” en la ĉina lingvo ja esprimas la decregulojn de konfuceanismo. Krome, li ple-dis ankaŭ por fileco, frateco, lojaleco, honesteco kaj hontosento. Pro la disvastiĝo de konfuceanismaj principoj, la vortoj pri homaj virttoj kaj ties malaj vortoj abunde aperis en la ĉina lingvo. Ekz., oni konsideris, ke kondutoj morale maldecaj estas hontindaj, do hontosento estis rigardata kiel unu el la homaj virttoj. Tiuj, kiuj havas hontindajn kondutojn, estas nomataj uloj sen hontosento, kaj tio estas tre severa riproĉo en la ĉina lingvo. La ĉinoj ŝatas la nekoruptiĝintajn ŝtatoficistojn kaj abomenas la koruptiĝintajn, ili nomas la antaŭajn puraj oficistoj kaj la lastajn malpuraj. Do, la vortoj “pura” kaj “nekoruptiĝinta” kaj la vortoj “koruptiĝinta” kaj “malpura” estas ofte kunligitaj kaj fariĝas kunmetitaj vortoj en la ĉina lingvo.

La ĉinoj alte taksas la volon de individuo. Ili konsideras, ke nur tiu, kiu havas firman volon, povas plenumi gravan taskon ĉu en politikaj ĉu en militaj kaj aliaj aferoj. Konfuceo foje emfazis: “La komandanto povas esti kaptita for de sia armeo, sed la volo de eĉ ordinara homo ne povas esti prenita for de li.” Kaj ankaŭ Mengzi (372-289 a.K.), la dua sanktulo de konfuceanismo, asertis, ke homo kun firma volo ne povas esti ŝancelita de mizero, nek tentita de riĉeco, nek subigita de potenco. Kaj tia homo estas nomata “noblulo kun firma volo”. Tiuj vortoj de Konfuceo kaj Mengzi fariĝis maksimumoj en la ĉina lingvo.

La vorto “lojaleco” origine signifas, ke oni devas esti lojala al la reĝo, sed poste ĝi enhavas ankaŭ la sencon “sindediĉo al la patru-

jo”. En la ĉina historio troviĝis nemalmultaj nobluloj, kiuj estis tiel lojalaj al la patrujo, ke ili preferis oferi sian vivon ol kapitulaci al la invadantoj. Ili estas tre admirataj de la popolo kaj nomataj “nobluloj kun firma patriotisma volo”. Kaj male, al tiuj, kiuj kapitulacis al la malamikoj, oni donis la nomon “perfiduloj de patrolando” aŭ “Han-jian”, kies senco estas perfidulo de la nacio Han*.

Konfuceanismo alte taksas la valoron de harmonio en la socia vivo, ĉar nur harmonio povas stabiligi kaj firmigi la familion kaj la socion kaj interpacigi kaj solidariĝi la popolon de la tuta lando. Por realigi harmonion inter la homoj, oni devas esti milda, bonkora, modesta, tolerema, grandanima, helpema, oferema, fervora, ĝentila ktp. Oni povas diri, ke tiaj vortoj pri homa kvalito estas vere multnombraj en la ĉina lingvo. Tiuj vortoj havas malsamajn signifojn, tamen kiel decreguloj ili ludas saman rolon en interhomaj rilatoj, t.e. sin teni amike kaj mildigi konfliktojn.

Tute nature, konfuceanismo, kiu estis kreita antaŭ pli ol 2 000 jaroj, havas multajn mankojn. Oni plendas, ke la decreguloj de konfuceanismo, tro rigoraj kaj rigidaj, fariĝis katenoj de homaj personeco kaj libereco. Kaj la plej netolerable absurda koncepto de konfuceanismo estas humileco de virinoj antaŭ viroj. Laŭ konfuceanismo, la edzino devas obei sian edzon, ŝi tute ne estas egalrajta kiel la edzo. Konfuceanismo fakte konsideras, ke virinoj estas nur dependaĵoj de viroj. Tiu absurda vidpunkto montriĝas eĉ en la ĉinaj ideogramoj. Ĉe la komenco la ideogramo “vir-

ino” estis simila al figuro de genuanta virino. La ĉinaj ideogramoj estas plejparte faritaj el du aŭ pli ol du partoj, el kiuj la kerna parto nomata “bushuo” en la ĉina lingvo estas uzata por indiki la esencan signifon de tiu ideogramo. Pro la influo de konfuceanisma koncepto, nemalmultaj ĉinaj ideogramoj, kiuj enhavas senco de malestimo, estas faritaj el la kerna parto “virino”, ekz., la supre menciita “jian” (perfidulo) estas farita el la kerna parto “virino”. Nuntempe, precipe post la fondiĝo de nia popola respubliko, la ĉinaj virinoj ĝuas tute egalajn rajtojn kiel la viroj. Do, la diskriminacio kontraŭ virinoj estas ĝenerale likvidita. Sed la ideogramoj kun senco de malestimo al virinoj estas malfacile forigeblaj.

LA KERNAJ PARTOJ “KORO”, “FAJRO” KAJ “SILKO”

Laŭ Mengzi, la funkcio de la homa koro estas pensado. Estas vere, ke en la ĉina lingvo la ideogramoj rilatantaj al penso kaj sento estas preskaŭ senescepte faritaj el la kerna parto “koro”, ekz., volo, amo kaj malamo, melankolio, ĝojo kaj malĝojo, indigno, timo kaj multaj aliaj. Tiu lingva strukturo klare atestas la tezon de antikvaj ĉinaj filozofoj, ke tio, kio produktas penson kaj senton, estas la koro, sed ne la cerbo.

Estas diversaj ĉinaj bongustaĵoj, sekve ankaŭ la metodoj de kuirado estas diverse nomataj. Ĉe la okcidentanoj estas simpla metodo de fritado, sed en la ĉina kuirarto troviĝas malsamaj metodoj de fritado, do, necesas havi malsamajn nomojn por esprimi la malsamajn metodojn. Ĉar por kuirado oni nepre bezonas fajron, la ideogramoj por tiu celo estas plejparte faritaj el la kerna parto “fajro”, kaj la vorto “fritado” ja havas “fajron” kiel sian kernan parton. Iuj ĉinaj manĝaĵoj estas nomataj laŭ kuir-metodoj, ekz., “huo-shao”, kuko bakita super fajro, portas nomon kun du

“fajroj”. La specoj de ĉinaj manĝaĵoj estas sennombraj, do ili havas sennombrajn nomojn kaj konsekvence estas sennombraj ideogramoj por ili. La ĉina kuirarto povas esti nomata “kulturo de trinkado kaj manĝado” kaj rigardata kiel parto de la ĉina kulturo, kaj al ili intime rilatas multaj ĉinaj ideogramoj.

Ĉinio estas lulilo de silko. La silkaj produktaĵoj estas ĝenerale nomataj “silkaĵoj”. Fakte, estas diversaj specoj. Ekz., la silka ponĝeo estas tre mola, kaj la ĉemizoj faritaj el ĝi estas komfortaj; alia silka teksaĵo nomata sateno estas glata kaj iom pli dika, kaj ĝi taŭgas por vintraj vestaĵoj; dume la silka gazo estas bona materialo por someraj vestaĵoj pro ĝia ven-

tola kvalito. Tiuj silkaj produktaĵoj havas diversajn specojn. Ekz., “broka sateno” estas sateno, sur kiu oni povas broki diversajn desegnaĵojn, kaj krepo estas tiel nomata pro ĝia falto. La ideogramoj por la menciitaj silkaj produktaĵoj estas ĉiuj faritaj el la kerna parto “silko”.

Kaj oni povas aserti, ke la ĉinaj ideogramoj estas parto de la ĉina kulturo, kaj en la vortoprovizio de la ĉina lingvo kaj la strukturo de la ĉinaj ideogramoj troveblas fenomenoj de la ĉina kulturo. ■

*En Ĉinio troviĝas 56 nacioj, kaj la nacio Han estas la plej granda el ili. Oni ĝenerale rigardas la nacion Han kiel ekvivalenton de Ĉinio. Do, la vorto “han-jian” signifas “perfidulon de Ĉinio”.

Respondu samideanaro!

Post memlernado de Esperanto en pli-malpli du jaroj, mi sukcesis korespondi kun ĉirkaŭ dek gesamideanoj. Kelkaj el ili estis ja bonaj e-istoj, dum aliaj estis kiel mi mem, nur komencantoj. Mi daŭre studadis E-on tagnokte por ĉiam pli bone posedi nian lingvon. Okazis tamen, ke multaj el miaj korespondantoj ĉesis lerni, tamen kuraĝiĝis respondi miajn leterojn. Sed ĉiam pli kaj pli malfacilis por mi legi leterojn. Sed mi ĉiam respondis ĉiun leteron, ĉar mi opinias tre grava respondeco respondi kaj stimuli kaj kuraĝigi samideanojn daŭrigi sian lernadon. Du jaroj post iniciato de korespondado mi havis eĉ 42 gekorespondantojn, tamen hodiaŭ (kvar jarojn poste), restas nur ses fidelaj korespondantoj.

Pro tio mi avertas: Lerni Esperanton estas vere ne facila tasko, ĉefe por iuj personoj, ĉu ne? Mi petegas al samideanaro nepre ne forgesi sendotajn respondojn en tirkestoj, ĉar esperantistoj, ĉefe komencantoj, soifas sendi kaj ricevi leterojn.

Eble la ĉeso de korespondado okazas ĝuste pro tio, ke kelkaj e-istoj ne respondas ĝustatempe, kaj tio taŭgas por malstimuli kaj senkuraĝigi komencantojn. Laŭ mi, ni esperantistoj havas multegajn aferojn por interŝanĝi, nacie kaj internacie. Esperanto estas ĉiam viva afero, por ke ni ŝanĝu ideojn, spertojn ktp. Bedaŭrinde, multaj e-istoj nur lernas kaj korespondas dum malmultaj jaroj kaj tuj poste forlasas la aferon. Tio estas vere bedaŭrinda, ĉar ni ĉiam havas multajn komunajn aferojn pritraktotajn, krom vere amikiĝi.

Eble oni devos ŝanĝi instrumanieron, ĉar tiel kiel nuntempe, ni nur perdas nian tempon. Malmultaj homoj scias, ke Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ kaj ĉefe “interna ideo”, pere de kiu oni amikiĝas por la tuta vivo.

Gesamideanoj, rekomencu korespondadon tuj! Alie vi forgesos nian lingvon.

Waldomiro Arenhart,
UEA-delegito en Brazilo

ĈINAJ VIRINAJ VESTOJ EN PRINTEMPO KAJ SOMERO DE 1999

Printempe kaj somere de 1999 ĉinaj virinaj vestoj tendencas al internacieco kaj montras profundajn naciajn kolorojn kaj estiĝis pluraj tendencoj:

Unue, lunlume. Tiaj vestoj estas faritaj el helkoloro supraj, delikataj, aĵuraj, krepaj, gazaj, kotonaj kaj kanabaj teksaĵoj. Kun naturaj kurbaj ŝultrumoj kaj modere lozaj talio kaj baskoj, la vestoj impresas nature kaj flirte.

Due, pasturalece. Tiaj vestoj estas faritaj el malhelkoloraj kanabaj, kotonaj ŝtofoj aŭ teksaĵoj el kanabaj, polietilenaj, silkaj kaj kotonaj fibroj. Ili impresas nature, malpeze kaj flirte. Ili bone montras la virinan naturecon, graciecon kaj insekseccon.

Trie, konĉerte. Tiaj vestoj estas faritaj el puncaj, palruĝaj, diafanaj gazaj teksaĵoj kun naciaj brodaĵoj kaj fremdlandaj bildoj aŭ el elastaj trikotoj aŭ ĵakardaj ŝtofoj. Ankaŭ la ŝelkhavaj jakoj kaj roboj, longaj ĉemizoj kaj jupeoj kun orienta kaj afrika stiloj apartenas al tiaj vestoj. El tiaj lakonaj formoj vidiĝas delikataj ornamaj artoj.

Deng naskiĝis en kamparana familio en antaŭurbo de Tianjin. Li estis normala en la korpopezo ĉe sia naskiĝo, sed poste kreskis tre rapide. Kiam li estis 7-monata, li jam pezis 15.5 kg. Septembre de la pasinta jaro li ekvizitis korpomalpezigan centron de Tianjin.

En la centro oni kuracis lin per akupunkturo, mokso kaj ĉinaj medicinaĵoj, kuracis lin ankaŭ per fizika kaj dieta terapioj. Post du-



Vestomontrado

LA PLEJ DIKA KNABO DENOVE VIZITAS LERNEJON

La 11-jara ĉina knabo Deng Xuejian 174.25 kg peza kun tallimezuro de 1.54 m ŝajne estas la plej dika knabo en la mondo. Tion jam konfirmis Interreto.

Post ekzameno kuracistoj konkludis, ke Deng kun normala intelekta kvociento havas neniun malsanon. Li ŝatas legi kaj ludi ŝakon. Ĉiam plidikiĝanta, li devigite ĉesigis sian lernadon portempe por kuraci sian troan grasecon.

onjaro lia korpopezo malpliĝis je 60.25 kg dum lia alto kreskis de 158 cm al 159 cm.

Antaŭ duonjaro li ne povis iri pro troa graseco, sed nun li povas piediri 20 km aŭ kuri 5 000 m kaj krome li povas ankaŭ ludi diversajn pilkojn.

S-ro Shi, estro de tiu centro, estas ĝoja pro la sukceso de sia laboro. Li diris: "Pro nescienca dieto, neregula vivmaniero kaj troa dorlotado far la gepatroj al iliaj infanoj eble aperos aliaj infanoj

pli dikaj ol Deng Xuejian, tial por solvi tiun problemon ni bezonas ne nur la medicinan disvolviĝon, sed ankaŭ la komunan penadon de la diversaj flankoj de la socio."

REFUTO AL LA "PROFETAĴO PRI PLAGO"

"La suno, luno kaj tero ne aperos sur unu rekta linio, ne okazos eĉ grava fluso. La homoj ne timigu sin mem," diris s-ro Wang, profesoro-esploristo de la Observatorio Zijinshan sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Lia parolo estas celanta al la tiel nomata granda terura kruco, plaga al la tuta homaro en 1999.

La tiel nomata tezo granda terura kruco, t.e. situo de 10 astroj sur la sama kruco estas legita en la libro "Plago de la tuta homaro en 1999" verkita de japano en la 70-aj jaroj. La libro notis, ke la 18-an de aŭgusto 1999 la 10 astroj de la suna sistemo viciĝos sur du linioj vertikalaj al la tero, tio signifas, ke la dio punos la homaron, kaj tio estos neevitebla plago.

S-ro Wang diris, ke efektive ne estos tia granda kruco, ĉar oni povas koni la ekzaktan situon de la suno, luno kaj planedoj. Pri tio informis nin la "Astronomia Almanako". Koncerne la situon je la 18-a de

aŭgusto 1999, la suno, luno kaj 8 planedoj, la japano diris ĝuste nur en du lokoj, t.e. la situo de Leono kaj Skorpio. Tiutage la 10 astroj troviĝos ne en 4, sed en 6 konstelacioj, nome, Leono, Pesilo, Kankro, Ŝafo, Kaprikorno kaj Skorpio. Tial la tiel nomata "10 astroj sur la sama kruco" estas senbaza.

S-ro Wang diris, ke sciencistoj jam antaŭkonis la rezulton de kolizio de astroido kontraŭ la tero kaj la Internacia Astronomia Asocio publikigis sian deklaron pri

la astroj proksimaj al la tero la 4-an de julio 1998. En la deklaro la asocio diris, ke oni devas fari komunan penadon por serĉi la astroidon, kiu eble flugos sur la orbiton de la tero kaj kiam oni certiĝos pri la ebleco de ĝia kolizio kontraŭ la tero, oni do senprokraste lanĉos kosmoŝipon por malhelpi ĝin, eksplodigi ĝin aŭ ŝanĝi ĝian direkton kaj rapidecon.

POR MALKAŜI SEKRETON SUB LA ANTARKTA GLACIO

Ĉinaj sciencistoj veturis 1 100 km de la Stacio Sun Yatsen fondita de ĉinoj mem kaj atingis kulminon de la antarkta glacio. Tie ili per glaciaj boriloj produktitaj de la ĉinoj mem eltiris du glaciajn cilindrojn el la loko 100 m profunda. Tiuj glaciaj specimenoj estis formitaj antaŭ 600 jaroj. Ili portis la glaciojn en Ĉinion por esplorado.

Ĉu ne estas sama la neĝglacio de la tuta mondo? Kial oni elfosis ilin en Antarkto?

Ĉina sciencisto Qin Dahe, kiu iam piediris tra Antarkto, diris, ke la ordinara neĝo kaj glacio formiĝas kaj degelas senĉese, dum en Antarkto la neĝeroj neniam degelas. Pro la senĉesa neĝado, tie la neĝglacio dikas averaĝe 2 450 m kaj ie ilia dikeco eĉ atingas 4 700 m. La neĝglacio en la plej profunda loko ja formiĝis antaŭ 300 000 jaroj. La fonto de sensala akvo de Antarkto konsistigas pli ol 85% de tiu de la tuta mondo. Tie oni povas degeligi neĝglacion por trinki. Tia akvo estas plej pura. La glacirivero formita de senĉesa neĝado estas bone distingebla. Dank' al esplorado pri la eltiritaj antarktaj glacioj glaciologoj akiris sciojn pri la detaloj kaj reguloj de la tera medio kaj ĝia klimato antaŭ centoj da miloj da jaroj. Pere de ekzameno de la glacio kaj esplorado de la denseco de ĝiaj jonoj kaj aliaj normoj, kiuj povas montri la kvaliton de la tiea medio, oni povas kontroli kaj esplori la tiean medion.



Ĉinaj sciencistoj en Antarkto

Ensemblo en montregiono



Fotoj de DING WEIGUO

Ili al prezentado por kamparanoj

En montregiono sude de la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono viglas ensemblo servanta al kamparanoj. Pro malfacila trafiko ĝiaj membroj devas mem porti per vektoj la rekvizitojn kaj valizojn. En la pasintaj 24 jaroj ili faris pli ol 4 000 fojojn da prezentado por la kamparanoj en ĉiuj izolitaj lokoj en la montregiono. La ensemblo estis honorita de la Ĉina Kultura Ministerio kiel tutlanda avangarda kultura kaj arta grupo.

Por ĝui ĝian prezentadon, la kamparanoj devas transgrimpi montojn. Ili tre ŝatas la de ĝi prezentitajn programerojn, tio multe entuziasmigis la membrojn de la ensemblo. Iom post iom la lastaj amikiĝis al la kamparanoj kaj ĉiufoje ĉe la prezentado la kamparanoj bonvenigis kaj adiaŭis ilin kiel intimajn parencojn, dum la sincereco de la kamparanoj profunde kortuŝis la artistojn. Dank' al la longtempa kontaktiĝo kun kamparanoj, ili estis multe inspiritaj en verkado de programeroj plenaj de lokaj gustoj. La ensemblo prezentis lokajn popolkantojn en ĉiuj anguloj de la regiono kaj eĉ en Pekino. Ses repertuaraj pecoj estis premiitaj en la tutlanda arta festivalo.




Magnetofono anstataŭ orkestro



Spektantoj



Ĝui prezentadon sur draŝejo



Antaŭ prezentado

La taoisto de Laoshan

(Novelo)

En Ĉinio, Pu Songling (1640-1715) estas vaste konata kiel aŭtoro de la novelaro "Mirrakontoj de Liaozhai". Multaj rakontoj el ĝi estis prezentitaj en bildolibroj, filmoj kaj televidaj teatroj. En 1994 la Ĉina Esperanto-Eldonejo presigis "Mirrakontoj de Liaozhai" esperantigitan de Laŭlum, tiel la novelaro estis tradukitaj sume en 31 lingvojn. Nun ni rekomendas al vi "La taoisto de Laoshan", peco de "Mirrakontoj de Liaozhai".

La Red.

de PU SONGLING

EN nia gubernio vivis iu sinjoro Wang, kiu estis la sepa filo de renoma familio. De sia knabeco li sentis grandan entuziasmon por taoismo. Aŭdinte, ke multaj senmortuloj vivas sur la monto Laoshan, li ekvojaĝis tien, kun librokesto sur la dorso.

Surgrimpinte montpinton, li trovis taoistan templon kvietan en izolita punkto. En ĝi sidis sur ronda tifaokuseno¹ taoisto, kun blankaj haroj pendantaj ĝis la nuko kaj serena mieno impresanta per majesteco. Wang kotoŭis² kaj parolis al li. La taoisto respondis per vortoj sonantaj kun mistereco. Wang petis, ke la taoisto akceptu lin kiel sian disĉiplon.

"Mi timas, ke vi estas tro drolita por elteni la penigajn servojn," diris la taoisto.

"Mi povas," respondis Wang.

La taoisto havis grandan nombron da disĉiploj, kiuj kolektiĝis en la vespera krepusko. Wang riverencis kaj salutis ĉiun el ili kaj restis kun ili en la templo. Frue en la sekvanta mateno la majstro alvenigis Wang, donis al li hakilon kaj diris al li, ke li iru kolekti brullignon kune kun la aliaj. Wang akceptis la ordonon respekto-plene.

Post pli ol unu monato la manoj kaj piedoj de Wang estis kovritaj de dikaj tavoloj de kalo. Ne povante elteni la suferojn, li pensis pri hejmenreiro.

Iuvespere, kiam li revenis, li vidis, ke du viroj drinkas kun la majstro. Kvankam jam krepuskiĝis, tamen ankoraŭ ne lumis lampo aŭ kandelo. La majstro tondis pecon da papero en formon de ronda spegulo kaj elgluis ĝin sur muron. Baldaŭ la ĉambro pleniĝis je lunlumo kaj eĉ harelto

estis klare videbla. La disĉiploj priservadis ilin irante tien kaj tien.

"En tiel bela nokto ĝojplena," diris unu el la gastoj, "ĉiuj devas kune ĝin ĝui." Tion dirante, li prenis vinkruĉeton de la tablo kaj ĝin donis al la disĉiploj, dirante ke ili drinku ĝis ebriiĝo.

Wang pensis: Kiel unu kruĉeto da vino povas sufiĉi eĉ por sep aŭ ok personoj? Sekve ili ĉiuj rapide serĉis bovlojn por ricevi vinon antaŭ aliaj, timante ke la vino en la kruĉeto elĉerpiĝos. Sed post ripetfoja elversado, la vino en la kruĉo tamen ne reduktiĝis. Wang tre miris.

Iom poste, unu gasto diris: "Dankon al vi, ke vi havigis al ni la lunlumon, tamen ni nur silente trinkas sen amuzo. Kial ne alvoki Chang'e³ el la luno?" Tiam la taoisto ĵetis manĝbastoneton en la lunon. Aperis belulino kaj eliris el la lunlumo. En la komenco, ŝi

altis je malpli ol unu futo, sed kiam ŝi atingis la plankon, ŝi ricevis la grandecon de ordinara homo. Ŝi havis sveltan talion kaj belan kolon kaj gracie dancis la Dancan de Ĉielarka Jupō kaj Pluma Robo. Tion fininte, ŝi kantis:

Ho feoj, ho feoj, vi teren revenas?

Sed Guanghai-palaco⁴ min plue katenas?

Ŝia voĉo sonoris arĝente kiel muziko de fluto. Tion fininte, ŝi ekturbis kaj saltis sur la tablon. En palpebrumo ŝi denove fariĝis manĝbastoneto antaŭ la mirigitaj rigardantoj. La tri viroj ekridegis brue.

“Ni havis vere plezuran vesperon,” diris la alia gastoj, “tamen mi jam ne plu povas trinki. Ĉu vi bonvolus trinki la lastan bovlon por min adiaŭi en la Luna Palaco?”

La trio sekve transmovis sian tablon malrapide en la lunon. Dum la trio trinkis sidante en la luno, la disĉiploj vidis ilin klare, eĉ povante distingi iliajn harojn de la brovoj kaj barboj, kvazaŭ en spegulbildo. Momenton poste, la luno malheliĝis iom post iom. Kiam disĉiploj alportis lumigitajn kandelojn, ili trovis ke la gastoj jam malaperis kaj la majstro sidas sola; tamen la restaĵoj de la manĝoj ankoraŭ troviĝas sur la tablo kaj la luno sur la muro refariĝis peco da papero simila al ronda spegulo.

“Ĉu vi jam drinkis sufiĉe?” demandis la majstro.

“Sufiĉe,” respondis la disĉiploj.

“Se jam, estas bone ke vi frue enlitiĝu, ke vi ne malfruiĝu por kolekti brullignon morgaŭ,” diris la majstro.

La disĉiploj jesis kaj retiriĝis. Wang sentis fortan admiron kaj estingiĝis lia deziro hejmeniri.

Pasis ankoraŭ unu monato. Wang trovis la penigan vivon

neeltenebla, kaj tamen la majstro instruis al li nenian magion. Ne povante atendi plu, li adiaŭis la majstron dirante: “Mi vojaĝis centojn da lioj⁵ por lerni de vi, mia senmorta majstro. Eĉ se mi ne povas ellerni la arton de senmorta vivo, eble estas ia bagatela magio kiun vi povas instrui al mi por kvietigi mian koron. Jam pasis pli ol du monatoj, dum kiuj mi nur eliris frue en la mateno por kolekti brullignon kaj revenis en la vespero. Kiam mi estis hejme, mi ne kutimiĝis al tia penlaboro.”

La taoisto respondis ridetante: “Antaŭe mi jam diris, ke vi ne povas fari la penigan servon, kaj jen vi pravigis min. Mi forsendos vin morgaŭ matene.”

“Mi laboris jam multajn tagojn. Mi petas vian moŝton instrui al mi bagatelan arton, ke mia alveno ne estu tute vana.”

“Kian arton vi deziras?” demandis la majstro.

“Mi vidis,” diris Wang, “kien via moŝto iris, la muroj ne povas vin bari. Mi kontentiĝus, se mi povus ellerni tiun magion.”

La taoisto konsentis kun rideto. Li instruis al li la sorĉvortojn, diris, ke li mem ilin recitu, kaj poste li kriis: “Iru tra la muro!” Wang staris antaŭ la muro kaj ne kuraĝis trairi.

“Provu ĝin trairi,” ree diris la taoisto.

Obeante la ordonon, Wang iris malhaste al la muro kaj estis haltigita de ĝi.

“Mallevu vian kapon,” diris la taoisto, “kaj trairu rapide, sen hezito!”

Do Wang retroiris kelk paŝojn de la muro kaj kuris al ĝi. Kiam li atingis ĝin, ĝi kvazaŭ ne ekzistis. Li sin turnis kaj trovis, ke li jam estas trans la muro. Li ege ĝojiĝis kaj reiris por danki la majstron.

La taoisto diris al li: “Nepre vivu honeste, alie la sorĉo ne

efikos.” Poste li donis al Wang monon por bezono sur la vojo kaj sendis lin hejmen.

Reveninte al la hejmo, Wang fanfaronis, ke li renkontis senmortulon kaj nun neniu solida muro povas lin bari. Lia edzino ne kredis tion. Wang faris laŭ la instruo de la taoisto, iris kelk futojn for de muro kaj poste kuregis al ĝi. Lia kapo tuŝegis la malmolan muron kaj peze li falis. Lia edzino helpis lin leviĝi kaj vidis, ke ŝvelaĵo granda kiel ovo leviĝis sur lia frunto. Ŝi mokis lin, ke li hontiĝis kaj tiel koleris, ke li insultis la taoiston pro lia malica koro.

La registrinto de la mirrakontoj komentas: “Neniu aŭdinto de la rakonto ne ridegas, kaj tamen la ridegantoj ne scias ke en la mondo ja troviĝas ne malmulte da sinjoroj kia Wang. Hodiaŭ estas uloj, kiuj amas malsanon kaj abomenas kuracilojn, sekve aperis al ili flatantoj, kiuj eĉ suĉas furunkan puson kaj lekas hemoroidojn por ili kaj konsilas plaĉe al ili, ke ili apliku brutalan politikon kun aroganteco por ilin flati, kaj trompe diris al ili: ‘Persistu en tiu ĉi politiko, kaj nenio baros al vi la vojon.’ En la komenco ili eble povas akiri iom da sukceso, sekve ili pensas, ke ili povas tiel agi je ĉiaj okazoj tra la mondo, kaj ili ne ĉesos antaŭ ol ilia kapo frapos kontraŭ malmolan muron kaj ili falegos.” ■

1. tifaŭ (Typha latifolia): multjara herbo kreskanta ĉe bordo de lago aŭ rivero. Ĝiaj longaj mallarĝaj folioj povas esti uzataj por plekti maton aŭ ujon.

2. kotoŭi: riverenci surgenua, foje ektuŝante la plankon aŭ teron per la frunto por montri grandan respekton.

3. Chang'e: feino, kiu flugis sur la lunon.

4. Guanghai-palaco estas sur la luno, kie loĝas Chang'e laŭ ĉina mito.

5. lio: ĉina mezurunuo de longo, egala al 500 metroj.

Kiamaniere ĉinoj intersalutas ĉe renkontiĝo?

Oni diris al mi, ke neniam ĉinoj salutas per manpremoj, ĉu vere?

ODETTE BERNET (Francio)

de PANG NAIYING

MANPREMO estas kutima maniero de saluto vaste aplikata en multaj landoj ĉe renkontiĝo, adiaŭo, gratulo kaj konsolo. En la antikva Ĉinio oni faris manpremon ĉe renkontiĝo en signo de intimeco, sed tio ne estis populara kutimo. Manpremo estis ĝenerale aplikata de ĉinoj de la komenco de la kuranta jarcento por anstataŭigi la "manĉuran salutmanieron".

Rilate manpremon la ĉinoj akcentas rangecon kaj aĝon de la manpremantoj. En ĉia okazo superulo, pliaĝulo kaj mastro la unuaj etendas siajn manojn por manpremo. La subuloj, junuloj kaj gastoj devas unue diri "saluton" kaj atendi ties mantendon. Ili neniel devas la unuaj etendi la manon al superulo kaj pliaĝulo. Se viro etendas la manon al virino, tiu lasta devas etendi la sian por manpremo. Manpremo de virino kun viro devas esti mallongtempa kaj facil-tuŝa. Se virino ne volas manpremi, ŝi devas sin levi kline por esprimi saluton, sed ne devas ignori ĝin. Ankaŭ ĉinoj opinias, ke estas malĝentile manpremi per mano en ganto. Sed estas escepto, nome virino en kostumo kaj ĉapelo. Sen aparta motivo oni ne etendas la maldekstran manon, nek devas manpremi sidante. Manpremante, oni devas rekte rigardi la salutaton por esprimi respekton.

Malsamaj manieroj de saluto estas farataj en malsamaj kazoj. Kutime manpremo estas farata en renkontiĝo de malnovaj konatoj, en unua renkontiĝo de nove konataj homoj kaj en akcepto de superulo al subulo. Se oni vidas konaton de malproksime survoje, oni bezonas nur mansvingon. Se oni renkontiĝas proksime, oni devas iom sin klini, demeti aŭ leveti la ĉapon, samtempe diri "saluton". En kunvenejo aŭ teatro

kie ne decas interparolo, oni intersalutas per kapbalanco kaj rideto.

Krom manpremo la ĉinoj havas aliajn manierojn por saluti. Ili estas kunmeto de la manoj aŭ duonpugnigitaj manoj antaŭ brusto, riverenco kaj brakumo.

Kunmeti duonpugnigitajn manojn estas tradicia salutmaniero transformita el antikva salutmaniero. Konfuceo estis honorita kiel "sanktulo", kaj lia plej eminenta disĉiplo Yan Hui "prainstruisto". Ĉie en Ĉinio oni konstruis konfuceajn templojn. En kulto oficistoj kaj konfuceanoj kultis Konfuceon per tre solena rito. Ili genuiĝis antaŭ statuoj de Konfuceo, klinis la kapon ĝis la frunto tuŝiĝis kun la tero. Antaŭ statuoj de Yan Hui oni riverencis kun la duonpugnigitaj manoj antaŭ brusto.

En la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.), kiam la reĝo akceptis feŭdestrojn, oni devis okazigi solenan ceremonion. En ceremonio la reĝo salutis la feŭdestrojn ne parencajn kaj portantajn malsaman familian nomon per svingo de duonpugnigitaj manoj malsupren antaŭ brusto. Al feŭdestroj parencaj sed portantaj malsamajn familiajn nomojn, la reĝo salutis per kunmetitaj duonpugnigitaj horizontale etenditaj antaŭ brusto. Al la feŭdestroj portantaj samajn familiajn nomojn, la reĝo etendis la kunmetitajn duonpugnigitajn manojn supren. Poste tio populariĝis inter la popolo. Nun la salutmaniero estis multe simpligita, kaj oni bezonas nur kunmeti la duonpugnigitajn manojn.

Kunmeto de la manplatoj estas respektoplena signo. Oni kunmetas la rektigitajn manplatojn antaŭ la brusto. Tio devenis de Hindio kaj aplikataj de budhistoj. Poste tiu maniero estis imitata en ĉinaj temploj. Ne granda parto de la ĉinoj ŝatas tiamaniere saluti sian konaton. Tiu

maniero enhavas la intencon de la salutanto en peto de beno de la budho al la salutato.


Riverenco ŝajne estas pli respektoplena ol manpremo, kunmeto de la duonpugnigitaj manoj kaj kunmeto de la manplatoj. Tiu maniero estas uzata de instruato kaj jungeneraciano por esprimi ilian koran respekton aŭ profundan dankon al la instruisto aŭ la maljungeneraciano. Tian salutmanieron oni ofte vidas ankaŭ en hoteloj, kiam kelneroj salutas gastojn. En Ĉinio tiu maniero estas multe malpli populara ol en Japanio.

La supre menciita "manĉura salutmaniero" estis uzata de manĉuroj en la lasta ĉina feŭdisma dinastio Qing (1644-1911). Intersalutante oni devis diri "Bonfarton al vi". Viro kaj virino havis malsamajn pozojn. Viro faris duonpaŝon antaŭen per la maldekstra piedo, duonfleksis la genuojn kaj tenis la antaŭkorpon klinita antaŭen, dum la dekstra brako malleviĝis rekte. Virino devis meti la interkroĉitajn manojn flanke de la dekstra gambo, flekseti la dekstran genuon.

Salutmaniero genuiĝo de hancio, antaŭe farata ĉe renkontiĝo de suvereno kaj kortegano, patro kaj filo, mastro kaj dungito, nun estas aplikata en kamparo, en antaŭvespero de la Nova Jaro aŭ en la Printempa Festo, kiam juna generacio salutas grandaĝulojn.

Oni povas diri, ke salutmanieroj de la ĉinoj ĉe renkontiĝo estas intermiksiĝo de la nunaj kaj antikvaj ĉinaj kaj alilandaj salutmanieroj. Tiu aŭ ĉi tiu maniero, ĉiuj estas esprimo de amikeco kaj respekto, kaj la eŭropeca manpremo montras pli da egaleco, dum la ĉinstilaj kunmeto de duonpugnigitaj manoj antaŭ brusto aŭ riverenco entenas modestecon kaj humilecon. ■

Ekrano de Qing-dinastio



Sur la ekrano estas groteskaj ŝtonoj kaj altaj florantaj osmanoj (*osmanthus*), kiuj estas oraj kaj faritaj per martelbatoj. Krome pendas luno kaj flugas nuboj. La artaĵo prezentas belan pejzaĝon de ora aŭtuno. La maldekstra supra angulo estas inkrustita per oraj versoj, kiuj prikantas osmanton. Sur la rando de la ekrano troviĝas desegnoj de drakoj kaj estas kadrita per pterokarpo.

La delikata ekrano estas fama artaĵo de Qing-dinastio (1644-1911). Ĝi, alta je 163 cm kaj larĝa je 118.5 cm, estas konservata en la Imperiestra Palaco en Pekino.



Ĉielarko super Lijiang-rivero

Foto de HUANG FUWANG

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

世界语《中国报道》一九九九年第八期

(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11-1339/G2